

esperanto



FEBRUARO 1992 • 85-A JARO • N-RO 1034 (2)

ISSN 0014-0035

gasteroste/o ♂ G. de tre malgrandaj fiŝoj kun dornoj sur la dorso, kies specio estas aŭ en sala aŭ en sensala akvo. Ĝi estas virbestoj konstruas nestojn kaj kovojojn k idojn; = dornfiŝo (Gasterosteus aculeatus).

☛ **gobiuso**. ~ **oformaj**. Ordo de fiŝoj, al kiuj apartenas la -oj (*osteiformes*).

Gaston/o. Virnomo.

gastr/o ♀ Teknika radiko, kiel: stomako. ~ **a**. Rilatoj al malsanoj de la stomako. ~ **gastr** stomaka mukoza membraro, ~ **gastr** doloro, kiun la -oj (epigastro). ~ **ekte** ekster de la stomako. ~ **gastr** stomaka k intestoj, ~ **gastr** gastropodoj. ~ **os** osostomo por ~oskopio. ~ **gastr** ekzameno de la intestoj (gastrokopto). ☛ **endoskopo**. ~ **stomic** celanta estigi inter stomako daŭran aperturon, tra kiu oni povas operaci sur la stomakon de la paciento, kiam la supra nutrokanalo estas obstrukta. ~ **gastr** Operacio, per kiu oni korektas la stomakon elekstere post laparotomio.

gastrofil/o ♂ G. de insektoj, kies larvoj parazitigas ĉevaloj (*Gastrophilus*).

☛ ♥ Muso, kiu ĝojas du ĝem...

g/o ☛ Nomo de instrumentoj por mezuri la **galbro**. **stang** ~ **o** elprenebla el la nivelo de likvaĵo (motoro). **tub** ~ **o**. For tubo sur flanko de vaŝilo oni povas vidi la nikaldronego.

Gaŭl/o = Gallo.

gaurio ☛ Daŭri... m. de e... aj farm... granda... ojn lo... frunto... gibo... o de... la (... is. C... aŭ... ele... ajn... pu... onv... bero... un... staf...

Gotan... de hi... arĝa na... ksmod... odio. Teksajo, r... no ks: fia... o, prepari... vundoj;



Gaston Waringhien
1901-1991

Enhavo

UEA funebnas la forpason de Gaston Waringhien (1901-1991)

- 21 Adiaŭ (Marjorie Boulton)
- 22 Funebra parolado de John Wells
Omaĝo (William Auld)
- 23 Kolombo en nova lingvo
- 24 Kiel memori lin?; Ju-jubileaĵaj versoj (Reto Rossetti)
Adiaŭ, Gaston Waringhien (Roger Bernard)
- 25 Ii jam silentos por eterne! (Iudovikito)
- 26 Gaston Waringhien (Michel Duc Goninaz)
- 28 Dankema adiaŭo al granda literato (Mauro Nervi)
- 29 Nekrologo pri Gaston Waringhien (Reinhard Haupenthal)
Gaston Waringhien: memore (Baldur Ragnarsson)
- 30 Malaperis erudiciulo (Jean Thierry)
Memore al kara amiko (Henri Vatré)
- 31 Informado: De Freŭdo ĝis nian informbudoj (2) (Ivo Durwael)
- 33 Pacifiko: Esperanto sub la kokosarboj (Maryvonne kaj Bruno Robineau)
Faka agado: Lerni turismon per Esperanto (Trevor Steele)
- 34 Esperanto en radio: Merkato difinas ankaŭ Svisan Radion Internacian (Andy E. Künzli)
- 35 Edukado: Eksperimenta projekto pri alfabetigo en Esperanto (Sabira Ståhlberg)
Studa, stimula somero en Svislando
- 36 Instruado: Metodiki per IKI (Francisco L. Veuthey); Nur rektametode kaj neflankiĝante...
- 38 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 39 Kalendaro 1992 (Internaciaĵ Esperanto-aranĝoj aprilo-majo 1992)
- 40 Nekrologo; Oficiala informilo

Vi trovos

ĉi-numere multvoĉan omaĝon al morda estiganto: al la homo kiu levis, fratoduope kun Kolomano Kalocsay, nian lingvon al senkonteste parnasa nivelo; al la aŭtoro – Montano de Esperanto – kiu donacis al ni la ĝenon eseo; al la poeto kiu kondensis universojn en unuversoj; al la gramatikistoj kiu difinis por ni klarajn, klareajn leĝojn; al la pensulo kiu analizis plene kaj sintezis serene; al la viro kiu donis al ni niajn vortojn. “Se mi verkus france, eble malpli da homoj legus miajn verkojn” diris li foje, kun malorgojla troigo. Ni devas esti dankemaj ke li donacis la pleje de sia krea forto al Esperanto, la lingvo pri kies estonteco li optimismis aktive, ĉiam kreive. Ĉirkaŭ liaj afablo kaj helpopreto gravitis multaj astroj de la Esperanta firmamento, ankaŭ tiaj kies orbito inter si ne proksimis.

Sennacisito, li varte aprezis la kreaĵojn de multaj nacioj, kaj peris ties verkojn, jen traduke jen esee, al nia supernaciana komunumo. Lia procezo multflanka spirito, lia konstanta ĉreesto intelekta faris lin kolono de nia kulturo, klasikulo jam en lia vivo – tiagrade ke de kelka tempo jam daŭranta la diskuto pri la signifo de lia rolo.

Eble li estis nia lasta klasikulo.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establiĝita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj, **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 55,12; USS 27; GM 48; enoj 3960; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kosta: 5,00 guldenojn.

Anonclarifo (gld.): 1 p. 1760; 1/2 p. 970, 1/4 p. 540, 1/8 p. 300, 1/16 p. 170. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kosta duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefaksno: +3110 436 17 51.

Teleksno: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.
Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (081) 542 0302; telefaksno (071) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdanska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-W-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Ian Jackson, 29 Graham Road, London W4 5DR, Britio; tel. (081) 995 6244; teleksno 8959991 coward g; telefaksno (071) 726 8561.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2650 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.
Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj telefaksno (02) 646 5413.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štivec, Nova Ves 87, CRO-41000 Zagreb, Kroatio; tel. (041) 42 92 51; telefaksno (041) 42 12 94.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Stefan MacGill, Eső u. 7 III, H-1034 Budapest, Hungario; telefon-mesaĝoj kaj telefaksno per HEA, (1) 15 60 244.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ino Saskia Idzerda, Bruchwiesenanlage 4 Zi. 801.4, D-W-6602 Dudweiler, Germanio; tel. (06897) 765402.

ADIAŬ

*Eklumis ordinare la mateno
kiam filino atentema trovis
la karan kapon sur la kapkuseno
kaj ordinaran vokon vane provis.
Tiel, sen ajna skuo de naturo,
Waringhien mortis en pariza turo.*

*Strange, ke tiom da profundaj scioj,
el liaj pluraj lingvoj, ĉiu vorto
forflugis, kvazaŭ noktopapilioj,
kaj krekapablojn tuj malkreis morto.
Nur lia arto indus por lamento
pri tia neniigo kaj silento.*

*Inspiro, persistemo, intelekto
povus riĉigi lin; sed grandanime
li sin dediĉis juna al elekto
kiu ordonas vivi pli viktme.
Ankoraŭ nia lingvo nur minoras.
– En sepdek landoj oni lin priploras.*

*Ploru! Plenmane donu ni liliojn;
salutu, adiaŭu, kun lamento;
daŭre bedaŭru tiujn vastajn sciojn
kiuj por ĉiam nulas en silento;
ĵus faŭkis niamonde fenda tru';
la karan voĉon ni ne aŭdos plu.*

*Sed vidu la vortarojn kaj eseojn,
tiujn tradukojn tiel ver-spegulajn
(la parkon kaj la florojn kaj trofeojn...),
proprajn poemojn tiel arde brulajn...
Pli daŭros, kiam ĉesos la lamento,
ol ajna bronzo, lia monumento.*

MARJORIE BOULTON

Funebra parolado de John Wells

Nanterre, Francio, 24 decembro 1991

Gaston Waringhien estis inter la plej brilaj figuroj en la historio de Esperanto. Li estis ĝia plej eminenta gramatikisto; li estis ĝia plej eminenta leksikografo; li estis en la unua rango de ĝiaj beletristoj. Sed lia talento estis pli multifaceta, ol nur tia.

Li estis ja lingvisto. Esperanto li lernis kiel 16-jarulo; sed neniel ĝi estis lia sola lingvo. Frue kaj brile licenciĝinte kaj agregaciĝinte, li profesie profesoris la latinan, la grekan, la anglan kaj kompreneble la francan. Kun tiu firma bazo filologa, li faris la plej gravan parton de la kompilado de *Plena Vortaro de Esperanto* (1930). Kvin jarojn poste li aperigis la monumentan *Plena Gramatiko* (en kunlaboro kun Kalocsay, kun kiu li verkis ankaŭ la brilan *Parnasa Gvidlibro*). Post la milito, per sia *Suplemento al PV*, li montris kiel modernigi kaj pluuniversaligi la vortrezoron de la internacia lingvo. Gravas, ke li bazis siajn rekomendojn ne sur propra fantazio, sed sur detala studado de la efektiva lingvouzo – precipe skriba: en la antaŭparolo al tiu verko li konfesis, ke li legis la tutan tiam ekzistantan literaturon de Esperanto.

Por sciantoj de la franca, dusence trezora estis lia *Grand Dictionnaire Espéranto-Français*. Lia leksikografa laboro kulminis per *Plena Ilustrita Vortaro* (1970), monumento kies influo restos longe post kiam ni ĉe-estantoj estos por ĉiam malaperintaj.

Waringhien publikigis kvin grandajn kolektojn da esoj. Tra la tuto brilas lia klara intelekta racio kaj erudicio, tamen ankaŭ kun malpeziga sprito. Se permesi personan memoron: Kiam aperis la dua kolekto, *Lingvo kaj Vivo*, mi estis 20-jara studento. Mi memoras kiel mi legadis ĝin preskaŭ seninterrompe dum tri plenaj tagoj, ĉar tiel sorĉe ĝi absorbis mian atenton. Prave iu nomis ĝin “la plej eksterordinara verko publikigita en Esperanto”. Cetero, per sia elfosado de la zamenhofaj praprovaj de Esperanto, kaj eĉ pli per editorado de la *Leteroj de Zamenhof*, Waringhien montris al ni pli klaran bildon de la kreinto de Esperanto ol ĉiuj ties ĝistiamaj biografoj.

Kiel beletristo, Waringhien elstaras ne nur kiel tradukisto (de Heine, de Heredia, de Baudelaire, de Umar



Kajjam), ne nur kiel redaktoro (*Nica literatura revuo*, kies kunfondinto li estis), sed ankaŭ kiel originala verkisto (precipe per poezio, *Duonoĉe* eldonita sub la pseŭdonimo G. E. Maura).

Jam 24-jara li estis elektita ano de la tiama Lingva Komitato. En la reorganiza Akademio de Esperanto, li fariĝis Direktoro de la sekcio Ĝenerala Vortaro. De 1963 ĝis 1979 li gvidis la Akademion kiel Prezidanto: periodo rimarkinda pro la sobra kaj sagaca funkciado de tiu nia lingva gvidorgano.

Nun, ve, tiu dokta sed foje iom petola vizaĝo ne plu estos vidata en la Universalaj Kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj. Kaj UEA funebnas Honoran Membro.

Mia samlandano, la poeto Marjorie Boulton, resumis Waringhien per orgio da adjektivoj:

Sciama, erudicia, dokta, klera, ĝisfunda, diligenta kaj persista, verama, aŭtentika, penslibera, kultura, krea, belamant' artista, humana, esplorema filozofa, senmaceca, homa, zamenhofa . . .

Trafé ŝi karakterizas lin. Cetero ŝi komparas lin al gasto, kiu restos longe ĉe ni en la koro:

en nia kor' ni tenas gaston.

Jes, en nia kor' ni tenas Gaston Waringhien. Ni lin ne forgesos. ★

Omaĝo

Maljuna koro cedis, kaj nestoro el niaj vicoj malaperis pace. Ripozas lia plumo, la laboro finitas, kiun faris li senlace.

Klero, belamo, skrupulemo, sprito en li kuniĝis majstre kaj unike. Estinte zamenhofa akolito, li iĝis popo niabazilike.

Li iris. Nia heredaĵo riĉas: plenplena trezorkesto da juveloj. Mi ŝatas pensi, ke li okupiĝas glosanta nun la lingvon de l' anĝeloj.

William Auld

Kolumbo en nova lingvo

ISTVÁN ERTL: *Kiel aspektas nia nuntempa E-literaturo el via jarcentlonga perspektivo?*

GASTON WARINGHIEN: Fakte, mi ne sekvas tiom regule la nuntempajn eldonojn, krom la tre gravaj eldonoj de Ludovikito, t.e. la Zamenhofa kolekto de Itó Kanzi. En mia aĝo oni relegas pli ol oni legas.

Kiujn? Ĉu ankaŭ vin mem?

Mi ne estas sufiĉe mem-admira por tio. Prefere la Antologio de Auld, la duan eldonon, kaj ankaŭ la novelan antologion *Trezoro*, ĵus eldonitan en Budapeŝto. Koncerne miajn verkojn, mi tamen relegas ilin okaze de reeldono... Por krei ion novan, mi ne plu estas sufiĉe juna: fizike kaj morale mi lasas. Mia kreemo estas do nur sekundara.

Ĉu vi ankoraŭ partoprenas iel en la movado?

Ne tro, kaj vere mankas al mi vojaĝoj, ĉeesto en kongresoj. Mi renkontas precipe kelkajn parizanojn, kiel mian amikon Roger Bernard. Mi multe korespondas, ekzemple kun Itó Kanzi, Marjorie Boulton, Henri Vatré kaj Reinhard Haupenthal...

Ĉu via "sekundara kreemo" etendiĝas al tradukoj?

Ne plu, krom por plenumi okazajn petojn, kiel ĵus traduko el Anatole France por la revuo *ILTIS-Forumo*...

Ĉu en via propra verkaro vi taksas pli alte la tradukojn aŭ la originalojn?

Ambaŭ estas sufiĉe legindaj, sed la franca publiko bedaŭrinde ne estas tre legema. Ankaŭ ĝeneralaĵ esploroj en Francio atestas tiun fakton. Ĉefe mi bedaŭras, ke la kvar volumoj de *Franca Antologio*, pri kiu mi tre multe laboris, restis sufiĉe malatentataj en la eldono de Lina Gabrielli. Eble iu iam reeldonos ĝin, ĉar ĝi estus verko utila kaj por la Esperanta kaj por la franca literaturoj.

Kion pri via poezia verkado sub la pseŭdonimo Maura? Ĉu tio estis nur ludemo? Vi tamen kreis legendon...

Simple, mia propra nomo ne estas sufiĉe poezia, tial mi elektis alian. Sed la estiĝinta legendo siavice influis la verkadon.

Kion vi ĝuis pli? Ĉu poezion aŭ kompiladon de vortaroj?

Verki la Plenan Gramatikon – kaj vortarojn. Kunmeto de vortaroj kaj poemverkado havas multon komunan: oni gustumas la sonojn de la vortoj, ekzamenas iliajn signifojn... ankaŭ la elekto de la ekzemplaj citaĵoj por PIV estis preskaŭ poezia agado, kvazaŭ provizi spiritajn nutraĵojn por la leganto.

Mi ofte legas dikajn vortarojn kun ĝua kiel romanon. Mia granda bedaŭro estas, ke mi ne povas labori pri la Esperanta-franca vortaro kaj prilabori la francan-Esperantan...

En BUDAPEŝTA INFORMILO (nov.-dec. 1990) aperis unu el la lastaj intervjuoj kun Gaston Waringhien. El ĝi aŭdiĝu lia viva voĉo.

Ĉu via sinteno pri Esperanto modifiĝis dum via vivo? Ĉu vi same kredas je ĝi nun kiel antaŭe? Ĉu mankas veraj signoj de kresko...

La disvastiĝo de Esperanto estos necese tre daŭra afero, ĉar ne eblas simple altrudi lingvon. Ni esperu, ke de temp' al tempo aperos "apostoloj", entuziasmigantoj, kiel la granduloj de la Esperanta historio. Se mi aŭdas pri la fervoro de junaj afrikaj samideanoj, se mi pensas pri la sindediĉo de Itó Kanzi en Japanio, se mi legas leterojn de miaj korespondantoj el Siberio, mi denove sentas optimismon. Ni estas malgranda, sed vaste dissemita popolo...

Por Kalocsay Esperanto estis "nobla bobio". Kian gravecon havis Esperanto en via vivo?

Ĝi ne estis la ĉefa afero en mia vivo. Tamen, inter miaj lingvoj, post la franca ĝi estas tiu, kiun mi plej ŝatas kaj plej bone uzas. Ĝi donis al mi vivocelon. Sed ĝi reprezentis por mi

ankaŭ socialan celaron; la penso de Lanti forte influis min. Mi estas dekomence kaj por ĉiam sennaciisto – nacioj estas la verko de la nuna mondo. Naciismo estas plej danĝera idearo. Mi aldonu, ke Lanti influis min ankaŭ lingve. Antaŭ ol konatiĝi kun li, mi parolis kun la francaj esperantistoj france, eĉ kun Grosjean-Maupin, kun kiu ni celis realigi la Plenan Vortaron. Tiucele ni kontaktis Lanti-n: mi trovis surpriza, ke li uzas Esperanton ĉiam kaj ĉiutage. Eĉ lia kunvivantino estis esperantisto, cetera la kuzino de George Orwell. (La sperto eĉ tiu kuzino inspiris Orwell por la lingvo *Newspack* en lia 1984.) Cetera, ankaŭ por Kalocsay, Esperanto estis ĉefa vivmotivo, sed li ĉiam restis tre profunde hungara. Ĝuste lia hungareco bone gardis la lingvon de troa latineco.

Neevitebla demando: kial verki en Esperanto?

Oni sentas la bezonon verki... Junaĝe, mi verkis poeziaĵojn en la franca kaj eĉ en aliaj lingvoj, sed la tradicio estis tro peza por mi, mi volis senti min Kolumbo en nova lingvo...

Kaj nun vi estas fariĝinta la tradicio.

... sed eble ne tro peza. Se mi verkus france, cetera estas eble, ke malpli da homoj legus miajn verkojn ol en Esperanto...

Kiaj perspektivoj ekzistas por la Esperanta verkado kaj, entute, por literaturo?

Ion post ion oni konstato, ke la amaskomunikiloj lasas la homojn nekontentaj. Multaj jam sentas, ke ilia suprajco ne nutras sufiĉe la homan sentemon. Ion pli profunde homan ili sopiras. Estos revigliĝo, kaj elano ankaŭ por Esperanto, kies literaturo ĝis nun senĉese evoluis. ★

Foto: I. Haupenthal



Kiel memori lin?

Ha, kiam da kordoj vibras en la animo se mi pensas pri Gaston Waringhien! Kion elektii inter ili? Ĉu la spritan kunulon ĉe 12 kongresoj en samtiom da landoj, aŭ ĉu la aŭtoron, kies vasta verkaro faris lin fosto de nia kulturo?

Kiun kordon mi nun pluku denove? Ĉu unu, aŭ la arpeĝon de pluraj tuisitaj en la kelkaj recenzoj, kie mi omagis lian multflankan talenton ekde PIV (la literatura aspekto) ĝis lia glora traduko de Umar Kajjam? Eble mi notu la kvietan modeston, kiu mergis lian laboron sendivide kun Kalocsay en *Plena Gramatiko kaj Parnasa Gvidlibro*? Mi ja titolis la recenzojn pri *Kaj la ceter'* – *nur literaturo* “La modesta giganto”.

Aŭ – ĉar mi jam regalis lin per tiuj versaj salutoj – ĉu tolerinda estus ankoraŭ unu rima peano?

Prefere mi prenas unu simplan faceton tute senpretendan: la etan regnon de liaj postkartoĵoj kaj leteroj. Li certe ne konsciis pri la gracia spirito en tiuj spontanaj skribetoj, sed ĝuste la koncizo donis al ili personan tembron unike simpatian. En ili, pli ol en liaj formalaj verkoj, sonoris lia intima voĉo kaj radiis la konata vizaĝo dum mi legis lian skribon.

Foto: I. Hauptenthal



Kaj mi revis: ĉu ne ankaŭ aliaj verkistoj faligis senatente tiajn gemojn? Jes, mi diris – ankaŭ Henri Vatré en la korespondado skribas tiel kurte kaj trafte, ke oni frandas ĉiun silabon.

Sub tiu rubriko okazis eĉ pri mi io neatendita. Dum semajnfino ĉe Manĉestra universitato, kie prelegis Lapenna, John Wells kaj mi, Lapenna devis min prezenti, kaj en tio li diris nur, ke mi “skribas bonajn leterojn”. Li do prilumis ian kvaliton akcesoran, kiun la persono mem eĉ ne rimarkas.

Ĉi tie temas simple pri leteroj kaj kartoĵoj skribitaj ne por ĝentilumi, sed pro neceso kaj utilo, kaj ĉiufoje, kiam enfalis al mi karto aŭ koverto de Vatré, aŭ Hauptenthal (kiu ankaŭ suke sin esprimas), aŭ Waringhien, mi kaptis ĝin avide, preta frandi la enhavon kaj ŝati ĝian artan minimumon.

Ĉe Waringhien mi povas diri, ke ĝuste tiuj komunikoj rivelis al mi la apartan stilan personecon de la konata aŭtoro – kaj tiam, nur tiam, mi povis lin karakterizi en la “Spegulo de esperantaj stiloj” en la libro *Arto kaj naturo*. Certe aliaj povas eĉi mian konstaton kaj eble iu pli arkivema ol mi scios aldoni al la verkaro de Gaston Waringhien unu postean volumon: liaj “miniaturaj”.

Reto Rossetti

Al Gaston Waringhien okaze de lia naŭdekjarigo

Ju-jubileaj versoj*

Korsaluton! kvardekjare daŭris nia interkono ekde kiam, malavare, trilis via laŭda tono pri Kvaropo, ho Gastono!

En via mio bebo kaŭra atendis je solena nasko. Vi baptis ĝin per nomo Maura kaj dotis per poema fasko. Jen, duonvoĉe, vi-tra masko!

Poste, lingve kaj leksiĉe vi fekundis en diversio, ĉiam klere kaj efike ĉu en prozo, ĉu en verso de l' germano, franco, perso!

Eseoĵ, Baudelaire kaj Heine aperis, ĉu ne, ĉe Stafeto kaj via sprito fontis fajne en la Schwartz kabareto: La tuto ŝajnas kvodlibeto!

Nun, por sigel' al ĉi kaprica sinua migro tra l' paseo (post gesto al Revuo Nica), gloron, pinta korifeo je via alta jubileo!

Reto Rossetti

*Ju-ju: ĝoja ekkrio (ĉe Ŝtefo Urban)

Adiaŭ, Gaston Waringhien

Adiaŭ, ho mia tre kara Gaston . . . , ĉar ni estis plej intimaj amikoj, jam de pli ol 56 jaroj. Ni ofte renkontiĝis, unue dum naciaj kaj universaj kongresoj, sed ĉefe post kiam li ekloĝis en suda antaŭurbo de Parizo, kaj laste dum deko da jaroj en Parizo mem.

Pri lia agado sur la Esperanta kampo, ĉiuj ja scias. Mi *asertas*, ke li estis nedubbele la plej granda, plej scia esperantologo en la 104 ĝisnunaj jaroj de Esperanto. Pri lia biografio mi nun nenion diras, skribinte pri tio en la libro *Li kaj ni*.

Kvankam Waringhien estis ateisto, li havis la sentojn kaj agojn de bona kristano: homo lojala, senartifika, neniam supereca – krome ĉiam bonkora, ĉefe al la malfeliĉuloj.

Li estos por mi neniam forgesita.

Roger Bernard

Mi prezentas mian koran
dankon al ĉiuj, kiuj
esprimis sian amikecon,
kaj bedaŭron pro la
malapero de mia patro.

Annette RICHARDEAU

Funebrantoj ĉe la enterigo
en Nanterre, 24 decembro



li jam silentos por eterne!

1991-12-22

hierau vespere, tra mia s-ro fenestro, s-ro milojeviĉ bonvolis sciigi min, ke nia granda amiko s-ro waringhien mortis.

jes, tio ĉi ja ne estis io neatendita por mi, ĉar ni povis antaŭvidi ĝin je la maljunulo, kiu jam atingis la altan aĝon de 90 jaroj. kaj tamen, la sciigo min frapis per ia surprizosimila opreso, kiu profunde malmumis mian koron tial, ke mi per unu fojo perdis kaj la neanstataŭigeblan amikon helpeman kaj la plej zorgeman gvidanton majstran.

tiu ĉi esprimo neniel apartenas al io troiga. mi ĵus finis la kompilon de niaj korespondadoj (1986-1991; 136 pecoj), la daŭrigon de nia antaŭa kajero: "post la iel-tiel kompletigo". ĝi titoliĝo: "ermitoj kuncelebris la majstron" kun jena subtitolo: "historieto pri la kompletigo de nia pvz". mi opinias, ke tiuj titoloj jam diras ĉion, kaj se oni legus ĝin, oni facile povus konstati kiom dediĉeme li bonvoladis kunlabori por kompletigi nian humilan entreprenon. sen lia varmkora apudestado kaj ĉiama kuraĝigado, mi publike konfesas, nia "plena verkaro" de ludoviko neniam povus atingi la nunan staton; ĝi certe ĉesus aperadi ie survoje.

lia helpo ne limiĝis je la spirita nek je la cerba, sed ĝi ankaŭ ampleksis la

materialan. mi citos nur jenan okazon: je la komenco de tiu ĉi jaro, mi perdis mian "sekularan" postenon kaj trovis malfacila elspezi por mia persona eldonado. aŭdinte tion, li tuj bonvolis proponi al mi sufiĉe grandan sumon por aperigi almenaŭ la lastan volumon de nia originalaro: "destino de ludovika dinastio", kiu dank' al lia utila helpo povis vidi la sunon en la printo tempo samjare.

per sia lasta letero de 1991-11-21 li bonvolis konfirmi la ricevon de la volumo V de la "ludovikologia dokumentaro" kaj skribi aldone, ke li fojfoje legas la pecojn jam aperintajn. kaj li aldone skribis, ke li eĉ trovis la leksikologie interesan fakton, ke de wahl uzis la formon "romanta" anstataŭ "romantika" en sia traduko (kolekto VII, p. 10, l. 9).

sed en tiu sama letero li amare daŭrigis: "mi volus pli longe kaj detale komenti viajn donacojn, sed mi estas superŝutita de hejmaj taskoj: mi migros al chambéry jam la 25an de decembro... kaj tie loĝos ĉe mia filino... se vi konsideras, ke la pezo de la jaroj kaj difekto de la memoro malfaciligas tiun klopodojn, vi facile pardonos mian provizoran silenton leteran..."


kaj ho ve! milfoje ho ve! mi nun devas toleri lian silenton eternan...

ludovikito

Gaston Waringhien

Malaperis homo, kiu sendube estis ĝis la 20-a de decembro 1991 la plej fama el la vivantaj esperantistoj. La estonteco, kiu jam komenciĝis, montras certe, ke li estis unu el tiuj malmultaj, al kiuj nia lingvo kaj la tuta esperantistaro ŝuldas multon.

Gaston Waringhien naskiĝis en Lille la 20-an de julio 1901. Post universitata studado pri filologio, beletro kaj historio de la religio, li sukcesis, estante nur dudekjara, la plej altan konkurson en la franca instruisistemo, la *agregation*, en la fako "klasika filologio" (tiamaniere plej bone tradukigas la franca *agrégation de grammaire*). Li kariiris kiel instruisto pri la



franca, latina kaj helena lingvoj en liceoj de Lille, poste de Turo (Tours), fine en Liceo Lakanal apud Parizo, kun kromaj kursoj en la universitato de Turo, poste en la Pariza Brita Instituto. Li kunlaboris ankaŭ en esploroj pri la franca lingvo kaj faris tradukojn el la angla al la franca. Li emeritiĝis en 1962. Tiu kariero estis interrompita, kiel por multaj viroj de lia generacio, pro kvinjara militkaptiteco en Germanio (1940-45).

Kun la zamenhofa lingvo li ekkontaktis, estante deksesjara, okaze de konatigo kun la filino de la helpkasisto de la Bulonja Kongreso. Dudekkvarjara, li iĝis membro de la Lingva Komitato. Kiel sciante, li estis pli poste akademiario kaj prezidanto de la Akademio. Lia multflanka agado priesperanta disvolvigis sur multaj terenoj, kiujn oni povas resumi per rubrikoj eble ŝablonaĵ, sed spegulantaj la multifacetecan de tiu eksterordinara viro.

La instruisto

Waringhien neniam neglektis la instruajn problemojn. Fondinte en 1934 Francan Esperanto-Instituton, li regule publikigis en *Franca Esperantisto* konsilojn al instruantoj kaj lernantoj. En 1935 li aperigis en la Kolekto de FEI plurajn didaktikajn verkojn destinitajn al lernantoj: *Gvidlibro por la ekzamenoj de SFPE, Facilaj Esperanto legaĵoj, Cours d'espéranto par correspondance* (1935-36, redaktita de Marthe Rameau sub lia direkto). En 1937 li adaptis al la franclingvaj uzantoj la *Ilustrita Kurso de Esperanto* de F. Szilágyi kaj publikigis la *Traduko de la prottekstoj en la Gvidlibro*. Li ne ĉesis interesiĝi pri problemoj de instruado, ĉar ankoraŭ en 1962 oni povis trovi liajn "konsilojn al instruistoj" sur la paĝoj de *Franca Esperantisto*.

La filologo kaj gramatikisto

Ekde 1932 aperis en diversaj esperantlingvaj revuoj (*La Nova epoko, Franca Esperantisto* k.a.) liaj recenzoj kaj notoj pri gramatikaj problemoj. Kolekto de liaj esperantologiaj eseoj aperis en 1959 ĉe Stafeto sub la titolo *Lingvo kaj vivo*. En tiu gravega verko li publikigis la restintajn dokumentojn pri la "praesperantoj" de 1878 kaj 1881 kaj pritraktis problemojn gramatikajn kaj leksikologiajn. Al tiuj filologiaj traktaĵoj oni devas aldoni la t.n. "editorajn demandojn", en kiuj Waringhien kritikas la eldonitajn tekstojn de *Hamleto*, de la Biblio, de la zamenhofa *Originala Verkaro*...

Sed la ĉefverko de Waringhien pri gramatiko estas evidente la *Plena Gramatiko de Esperanto*, kiun li kun-aŭtoris kun Kalocsay kaj kies unua eldono aperis en 1935. La nunaj legantoj konas ĝin sub la titolo de la plej lasta eldono (1980), *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. La celo de tiu verko estis: "studi kaj redukti al reguloj la uzadon de Zamenhof kaj de la bonaj klasikaj verkistoj"; ĝia principo: "konstati, ne proponi". Unu el la karakterizaj trajtoj de tiu verko – la plej ampleksa gramatika pritrakto de nia lingvo – estas la klarigo de la vortfarado en Esperanto per la tre diskutata kaj diskutinda teorio de la "gramatika karaktero de la radikoj".


En 1946 Waringhien publikigis tre modestan laŭ amplekso, sed tre riĉan

laŭ enhavo, priskribon de Esperanto por francalingvanoj laŭ gramatika kaj filologia metodo: *ABC d'espéranto à l'usage de ceux qui aiment les Lettres*, en kiu li montras la duoblan vizaĝon de Esperanto: eŭropan kaj orientan.

La leksikologo


La diversaj traktaĵoj de Waringhien montras, ke li estis ne nur leksikografo, sed leksikologo. Tamen liaj plej konataj verkoj estas sur la leksikografia tereno.

Jam en 1930 li, laŭ instigo de Lanti, kunlaboris kun Grosjean-Maupin, Esselin kaj Grenkamp-Kornfeld por kompilado de la *Plena Vortaro de Esperanto*, eldonita de SAT, unua vortaro Esperanta kiu meritas tiun nomon. Li mem redaktis la Supplementon, aperintan kun la 4-a eldono en 1953. En 1970 aperis post giganta laboro la 1300-paĝa *Plena Ilustrita Vortaro*, kiun Waringhien redaktis kun la helpo de ĉ. 50 kunlaborantoj. Pro la enmeto de multaj propraj nomoj ĝi iĝis kvazaŭ eta enciklopedia vortaro. En 1987 aperis la *Suplemento* al PIV. Dum la lasta jaro de sia vivo, Waringhien sekvis atente kaj helpis per konsiloj la laboron komencigantan por nova, reviziita eldono de PIV.



Waringhien ankaŭ laboris super Esperanta-naclingva vortaro: la *Grand Dictionnaire Espéranto-Français* aperis en 1957 kaj estis reeldonita, plivastigita per suplemento, en 1977.

La ideojn de Waringhien pri leksikografiaj laboroj – interalie pri la neologisma problemaro – oni povas trovi en 1887 kaj la sekvo.



La zamenhofologo

Kiel jam dirite, Waringhien tre serioze okupigis pri la unuaj jaroj de la Esperanto-movado. La jam menciita editorado de praesperantoj kaj liaj filologiaj, etimologiaj k.s. esploroj (inter kiuj menciindas la editorado de la 6-a eldono de la *Lingvaj Respondoj* en 1962) ne elĉerpis lian esploradon ĉi-flanke. En 1948 li publikigis du volumojn de la *Leteroj de Zamenhof* (260 leteroj ĝis tiam republikigitaj), kiuj ilustras la "tragedion de la vivo" de la aŭtoro de Esperanto. La volumo IV de liaj Eseo (*1887 kaj la sekv...*) enhavas plurajn zamenhofologiajn artikolojn, inter kiuj aparte menciindas la ideologia dramo de Zamenhof".

La beletristo


Sur la tereno de beletro, kiu certe estas la plej grava kaj la plej interese en la tuta verkaro de Waringhien, lia agado estis multflanka:

Kiel teoriisto de la poezio, li estis kunaŭtoro (kun Kalocsay) de la *Parnasa Gvidlibro*, kiu, aperinte unuafoje en 1932, estis la unua – kaj estas ĝis nun la sola – traktaĵo pri la esperantlingva prozodio. Tiu verko, kiu "donas ĉion, krom genio", enhavas *Skizo de Esperanta metriko* de Waringhien, *Arto poetika* de Kalocsay, kaj *Rimvortaro* de Waringhien kaj, en la novaj eldonoj, de Roger Bernard.

Waringhien verkis multe kiel recenzisto. Lia unua recenzo, aperinta en *Literatura mondo* (1932) temis pri la fama verko de Kalocsay *Eterna bukedo*. Li ne limigis sin al recenzo de beletraĵoj, sed komentis lernolibrojn, verkojn pri politiko, filozofio k.a. Modelojn de recenzo li donis en *Kaj la ceter...*

Kiel tradukisto li produktis verkaron ampleksekan, kiu enhavas preskaŭ nur poeziaĵojn. En 1931 aperis en *Literatura mondo* liaj tradukoj de poemoj de Heredia, Heine, Victor Hugo, kaj

tradukoj el lia plumo ne ĉesis aperi en la esperantlingvaj revuoj ĝis en la ĵusaj jaroj. Inter liaj libroformo aperintaj tradukaĵoj troviĝas verkoj de la literaturo franca: La Rochefoucauld: *Maksimoj* (dulingva teksto, 1933); Nerval: *La himeroj* (dulingva teksto, 1976); Heredia: *La Trofeoj* (1977); Baudelaire: *La floroj de l' malbono* (redakto plus traduko de ĉ. kvarono de la poemoj, 1957); al kio aldonigas kvar volumoj dulingvaj *Tra la parko de la franca poezio*, vera antologio



de la franclingva poezio, aperinta inter 1977 kaj 1984, kaj traduko de malnovaj francaj kanzonoj. Sed oni trovas ankaŭ tradukojn el la lingvoj germana (Heine: *Kantoj kaj romancoj*, kunlabore kun Kalocsay) kaj persa (*Robaĵoj* de U. Kajjam).

Waringhien famigis ankaŭ kiel eseisto. Liajn eseojn oni povas pristudi el pluraj vidpunktoj, ĉar multaj el ili estas dediĉitaj ne nur al beletro, sed al esperantologio kaj lingvaj problemoj. Tamen la tute de liaj eseoj kunigis en kvin volumoj, kiuj estas: *Beleto* (1956/1987), en kiu oni trovas studojn pri diversaj gravaj verkoj de la esperant-



lingva literaturo (Biblio, *Hamleto*, *Eterna bukedo*...), portretojn de kelkaj famaj esperantistoj (Lanti, Schwartz kaj... la mistera Maura), kaj studojn pri kompara literaturo; *Lingvo kaj vivo* (1959/1989); *Ni kaj ĝi* (1972), pri religio kaj arto: io tute aparta en la verkaro de Waringhien, sed kio montras la vastecon de liaj scioj kaj intereso. La plej granda parto – pri religio – estas dediĉita al kritiko de la kristanaj dogmoj kaj tradicioj; *1887 kaj la sekv...* (1980), esperantologiaj eseoj; *Kaj la ceter' – nur literaturo* (1983), denove kiel la unua volumo, dediĉita al beletro Esperanta (pri la budapeŝta skolo, la traduko de Zamenhof) kaj diverslingva (pri Goethe, Kipling, la belga literaturo k.a.).

Rimarkinda estas la strukturo de tiu kvinpovo: la unua kaj la lasta volumo estas dediĉitaj al beletro, la dua kaj la kvara al esperantologio, dum la esaro pri religio kaj arto (la respondo de la homo al la mistero, al la morto) okupas la centran lokon.



Waringhien estis ankaŭ la ĉef-redaktoro de la *Nica literatura revuo*, kiu aperis inter 1955 kaj 1962 kaj iĝis inda daŭriganto de *Literatura mondo*. En la Nica revuo aperis multaj recenzoj, tradukoj k.s. de Waringhien. Li kapablis kunigi sur la paĝoj de tiu revuo la plej talentajn verkistojn de tiu epoko (M. Boulton, E. Urbanová, C. Conterno, Baghy, Kalocsay, Auld, Francis, Tárkony, Vatré, Miyamoto, Schwartz, Szilágyi, Newell, Régulo, Thorsen, Ribillard, Rosbach, Mattos, R. Bernard k.m.a.).

La poeto Waringhien estas malpli konata. Malmultaj liaj poemoj aperis sub la propra nomo. Sed ĉiuj nun scias, ke li sin kaŝis sub la pseŭdonimoj G. E. Maura kaj Georgo Peterido Peneter.

Duonvoĉe (1939/1962), la unika poemaro de Maura-Waringhien, estas modelo de arta konstruaĵo pro sia

plano, pro la variceo de la temoj kaj formoj, pro la aŭdaco de la lirikeco kaj samtempe la ekvilibrado de poeto kiu uzas siajn travivaĵojn kaj sian erudicion por atingi la simplecon kaj la arton de la nuanco. La "malfrua fil' de l' olda paganismo" donis al la legantoj poemon, kiu estas unu el la plej talentoplenaj kaj plej gravaj en la ĝisnuna historio de la esperantlingva poezio.

Sub la nomo G. P. Peneter, Waringhien okupas grandan parton de la *Libro de Amo*, kies unua parto konsistas el la represo de la *Sekretaj Sonetoj* de Peneter-Kalocsay. Oni retrovas en tiu ĉi verko, konsistanta el kelkaj tradukaĵoj kaj multaj originalaĵoj, la varingenjan virtuozecon, aplikitan al erotiko, per kiu li montris sin supera al Kalocsay. La lirika parto de *Duonoĉe* estis amdeklaro al unu amatino; la *Kongresaj plezuroj* de la *Libro de Amo* estas laŭdo al la amarantinoj, taglibro de donjuano.

La humanisto

Tiu ĉi vorto certe resumas la tutan personecon de Waringhien, filologo kaj beletristo laŭ la klasikaj kriterioj kaj partopreninto de progresemaj sociaj movadoj. En la tridekaj jaroj li aktivis en la franca socialista partio kaj en la framasonaro. Ĝismorte li – sub la matrikulo 17296 – restis por ĉiuj SAT-anoj fidela kamarado.

Waringhien estis humanisto, kiu tra erudicio ĉiam celis – sen iluzio, tamen kun espero – al homo pli homeca,

kio tra la poezio ĉiam celis al klareco kaj komprenebleco,

kio tra la postuloj de Racio – kontraŭ ĉiuj superstiĉoj, kiuj malhumanigas la homon – fakte strebis al la Mistero, al la Nekonato, al la eternaj homaj demandoj: kial, kiu, kien . . .

kio, predikante hedonismon, ne povis forturni sian rigardon disde la homa suferado,

kio, asertante sin nekredanto, ne

ĉesis dialogi kun Dio kaj, laŭ la ekzemplo de la hebrea psalmisto, postulaĵis de Ĝi klarigojn,

kio, seniluziiginte pri la eblico ke la homo iĝu pli saĝa, konsilis tiun minimuman programon: almenaŭ ne aldoni suferojn al niaj homfratoj,

kio, neniel partoprenante la iluzion de la tradiciaj esperantistoj pri iu "fina venko", donis al la esperantista popolo tiun minimuman programon: almenaŭ elteni . . .

kio konsilis kaj praktikis toleremon kaj humuron ne pro intelektularaj principoj, sed kiel rimedojn por plifaciligi la vivon.

La giganta laboro de Waringhien disvolvigis dum ĉirkaŭ du trionoj de la ĝisnuna vivo de lia lingvo. La estontaj esperantistaj generacioj pritaksos la limojn, inter kiuj li restis. Sed ili dum longa tempo ĝuos la trezorojn kiujn li postlasis.

Michel Duc Goninaz

Dankema adiaŭo al granda literatoro

Ni honoras la nomon de Gaston Waringhien, kies vivoverko siaflanke honoris dum tiom longa tempo la literaturon en Esperanto. Plena pritakso de lia kontribuo al nia lingvo kaj literaturo estas impona tasko, kiu ĉi-tempe povas nur komenciĝi; kiam tiel elstara aŭtoro malaperas, samtempuloj povas nur elmeti siajn impresojn, kaj sian respekton al eminenta literatoro; ĉi-kaze, al vere klasika verkisto. – Kiel ĉiuj klasikuloj, kiel lia granda amiko Kalocsay, Waringhien estis riĉe multifaceta. Nur du el tiuj facetoj mi rapide citu ĉi tie.

Unue, la alta kvalito de la Waringhien-a prozo. Lia Esperanto estas supra instrumento, riĉa kaj esprimiva; liaj esoj estas probable nia plej alta proza modelo. Foje li aminde babilas, per francaj ironio kaj klareco; foje li pli science diskutas, kaj tiam lia stilo fariĝas akra kaj preciza, ĉiu vorto taŭge enlokiĝas en la frazon, kaj la lingva fluo ek similas al muziko, en kiu eĉ ne unu noton oni povus ŝangi sen korrupti la tuton. En la kampo de prozo, do; post Zamenhof, Waringhien.

Sed sian plej intiman kaj kortusan vorton diris Waringhien en la poemoj kiuj aperis sub la nomo G. E. Maura.



Duonoĉe, jes, sed per tono senŝancela li flustras al ni versojn klasike diafanajn, intense emociajn, tre proksimajn al perfekte. En lia temaro, erotiko mirinde kaj nedistingeble fandiĝas kun eksterordinara pentro-kapablo; amo al Parizo kaj amo al iu bruna virino ŝajnas nedisigblaj en lia menso. La ideoj premas, kaj la formo bredas; ju pli obsedas la emocioj, des pli distiliga la versoj, ĝis tiu ekstreme rafinita rezulto: la "unuversa universo", iel tipe Waringhien-a versoformo, kiu en ununura linio resumas bildon, ideon aŭ rakonton:

*Je l' pinto de l' argentaj betuloj
lumo kantas*

aŭ:

*Teren kristale ŝutas alaŭdo
sunpecetojn*

aŭ:

Ŝi, tiel frue, tiel gracila, tra la pluvo

kaj multaj aliaj, admirindaj fragmentoj. (I.a.: *Duonoĉe* ankoraŭ aĉetebblas ĉe UEA; ne maltrafu la okazon riĉigi vian librokolekton per forgesita juvelo, kaj samtempe omaĝi al la granda forpasinto.) – Aparte vekas mian admiron lia kapablo maksimume densigi sian poezion inspiron kaj tamen resti perfekte komprenebla ankaŭ al la plej naŭva leganto, dank' al "tiu mani" arkaja de l' klareco", pri kiu li prave fieris.

Multon mi prisilentis – liajn tradukojn, lian lingvan kaj vortaran aktivecon ktp – kaj intence, ĉar tiu ĉi ne estas esoo, sed dankema adiaŭo al granda literatoro, kiun mi neniam konsis persone, sed kiu ofte emociis min. En unu el la lastaj "unuversaj universo" li skribis:

*Morto, florvepro nigra!
Morto, senstela sonĝo!*

Tiu sonĝon li sonĝas nun, kaj restas al ni la kritika tasko pli atente kaj nuancece aŭskulti lian voĉon, kiun postrestas en volumoj kiujn la tempo ne igos flavaĵ.

Mauro Nervi

Nekrologo pri Gaston Waringhien

Kiam, frue en 1991, Gaston Waringhien informis min, longe antaŭ ol ĝin sciis la parizaj amikoj, pri sia okazanta translokiĝo al Chambéry, li aldonis: "Cetere, laŭ La Fontaine, ĝis tiam *Le roi, l'âne ou moi seront morts!*" [la reĝo, la azeno aŭ mi estos mortaj].

Efektive, la penso pri la morto tirigis tra liaj lastaj leteroj al mi, kaj mi kredas, ke subkonscie li rifuzis la ideon, ke en la profunda aĝo li ankoraŭfoje saĝu la log-lokon kun ĉiuj penoj ligitaj al tia entrepreno. Kiam la neevitebla dato proksimiĝis, kiam li jam disanoncis la novan adreson, adiaŭis la parizajn amikojn (mi eĉ telefonis kun li en la vespero premorta), pretis akompani la gefilojn al Savojo, lin atingis la morto, en espero, sen doloro. Li forlasis la vivon ja abrupte, sed serene-suverene, kiel grand-sinjoro.

Kun li estingiĝas periodo daŭrinta pli ol ses jardekojn kaj komenciĝis la postvaringjena erao de nia Afero. De nun validos, kion antaŭdiris Marjorie Boulton fine de sia vizia poemo en *Li kaj ni*:

*Aktiva kiel verbo dum la vivo,
tiom doninte, donos vi la
nomon;
utilos vi en form' de adjektivo,
laŭde resumos verkon, scion,
bomon;
kaj, kiel zamenhofa, varingjena
por ĉiam estos vorto vere bona.*

Eble nur Zamenhof kaj Kalocsay lasis en nia lingvo spurojn tiel profundajn kiel tiuj de Waringhien. Kiam li revenis en 1945 el germana milit-kapiteco, lia nomo jam estis kvalitat-artiklo pro verkoj kiuj frue firmigis lian famon kaj kies utilo por la lingvuozanto restas ĝis hodiaŭ: *Plena Vortaro*, *Plena Gramatiko* kaj *Parnasa Gvidlibro* restas fidindaj orientiloj. La disĉiplo de Grosjean-Maupin memstarigis kaj siaflanke iĝis la modelo por aliaj per *Grand Dictionnaire* (Eo-F) kaj *Plena Ilustrita Vortaro*. Neniu lin superatutis ĝis nun, kaj li mem, per siaj suplementoj al ĉi vortaroj, zorgis ke ili ne tro rapide eksmodiĝu aŭ postrestu.

Sed Waringhien ne estis nur teoriisto de la lingvo: li estis, kiel Kalocsay, multifaceta kaj plurtalenta. Sur la kampo beletra li elstaras kiel tradukisto, kiel originala lirikisto (kiu longe



Foto: I. Hauptenthal

kasís sin sub la mistera pseŭdonimo Maura), kiel aŭtoro de eseoj, ĝenero kiun li hejmis en nia lingvo kaj kie li ĉiam brilos kiel mirinda majstro.

Al ĉio ĉi aldoniĝas la sep redaktoriaj jaroj super la *Nica literatura revuo*, la administraj laboroj en Franca Esperanto-Instituto, kaj lia prezidanteo en la Akademio de Esperanto, kiun li gvidis perspektive-klarvide.

Waringhien estis ankaŭ stimulantulo kaj kuragiĝanto, trankvila laboristo postkulisa. Miajn proprajn paŝojn tra la Movado li akompanis per siaj leteroj ekde 1965, kaj dum la lastaj jaroj nia korespondado iĝis ĉiam pli ofta. Sen lia helpo mi perdintus la kuraĝon konduki al feliĉa fino la libron *Rikolto*, la verk-bilancon de unu el liaj eldonistoj, Juan Régulo Pérez.

Itŭ Kanzi donis jam ideon pri la gravo kaj denso de la Waringhien-korespondado. Gardi kaj alirebligri ĉi postlasaĵon estos unu el la gravaj taskoj de la futura varingjenologio.

Reinhard Hauptenthal

Gaston Waringhien: memore

El kia fonto lia saĝo fluis?
Ne nur klereca, kies klaro brilis
el firmaj frazoj, kiuj fid-profilis
sian aŭtoron, kies verkojn ĝuis

Ĉiu amanto de la inda vorto
trafe metita, saturita pense,
tial li nutris, maturigis mense
niajn lingvanojn, per sia klera forto.

Tiele ja; sed ankaŭ roz-petalojn
la fonto portis, kiuj flu-subtile
arangiĝis sin versojn fajna-stile
por levi nin trans tirajn trivialojn.

Klasika klar' kaj ruĝo delikata
restos kun ni post forapero fata.

Baldur Ragnarsson

Malaperis erudiciulo

La unua fojo, kiam mi renkontis lin, estis antaŭ tridek sep jaroj en unu el la kabaretaj vesperoj de Raymond Schwartz ĉe La Tri Koboldoj, kiujn li volonte vizitadis ĉu por prezenti poemon, ĉu por debati pri gramatik(l)a punkto. Tiam temis pri sintaksaj rilatoj en la jena frazo aperinta en revuo: "Ĝi vidis maturiĝi apud si junajn knabinojn." La diskuto estis vigla pri la preskobolda versaĵneko de "apud si"!

En 1955 mi havis la okazon viziti lin en la hejmo en Choisy akompane de Prof. Régulo Pérez. Tiam miaj okuloj trafis la sliparon, en kiu ĉiu vortelemento kaj ties uzmaniero estis sur aparta papereto registrita, precipe kun diversaj referencoj de verkoj kaj aŭtoroj: Gaston Waringhien pretigis sian vortaron Esperanto-francan de 1957. Mi rimarkigis al li, ke plej urĝa por la lingvo estas la eldono de nova Plena Vortaro; al tio li respondis ke ĝuste la Esperanto-franca estas unua stadio destinita pliprecizigi semantikan valorojn por la preparo de nova Plena Ilustrita Vortaro. Kaj efektive ĉi tiu verko, kies paĝojn mi poste legis de

A ĝis Z interalie por preskorektado, estis ja en 1970 la frukto de profunda, pacienca erudicio bazita sur detala analizado de la skriba uzado de la vortelementoj; cetero por vortaro la skriba lingvoformo estas pli fiksa ol la parola.

Kiam ĉesis La Tri Koboldoj, ekaperis la *Nica literatura revuo*, kaj tiam ĉirkaŭ la redaktoro ĉiumonate vespermanĝis ia rondeto kun R. Bernard, L. Laurat, Nels, R. Schwartz kaj mi mem. Ni plezure interŝanĝis ideojn pri gramatikaj aŭ leksikologiaj punktoj kaj komentis inter ni diversajn artikolojn de revuoj; interalie furoris ĝis 1962 la demando pri "ata-ita".

En 1972 mi vizitis lin ĉi-foje en lia pariza hejmo. Li ĵus estis releginta la manuskripton de mia kurso-libro *Esperanto sen peno* ĉe Assimil, kaj li prezentis al mi plurajn rimarkojn fruktdonajn pri kelkaj punktoj.

Sed tuj post la malapero de pluraj amikoj el la rondo (Laurat, Nels, Schwartz), la monataj manĝoj fariĝis tagmezaj kaj ne vesperaj. Eĉ la tagon antaŭ la forpaso de Prof. Waringhien, Roger Bernard kaj mi ankoraŭ manĝis kun li en la pariza restoracio China Town. . . . Ja kiel agrabla estis la kunestado kun li, homo de neelĉerpebla eruditeco. Cetero ankaŭ tiuj kiu ĵuplure legis liajn prelegojn, certe spertis tion!

Jean Thierry

Memore al kara amiko

Antaŭ kristnasko la anonco pri la ĵusa morto de la 90-jara profesoro Waringhien mi profundeme malĝojigis. Tamen, iom post iom, kun la memoro pri la multaj belajoj kiujn ni ŝuldas al li, revenis pli serena humoro.

Nur unufoje mi povis lin renkonti. Estis en 1935 dum la Roma UK. Poste, tra la jaroj, sekvis ne ofta, sed regula korespondado, ĉar li ĉiam restis tre fidela en amikeco. En sia lasta letero (07.03.91), li skribis ke lia sanstato "estas tolerebla, kaj ne tro handikapas en la revizio de la Suplemento al la *Grand Dictionnaire*, kiun SAT dezirus reeldoni post unu jaro."

Ĉiuj liaj leteroj alportis al mi bonon. En *Li kaj ni*, mi skribis ke Gaston Waringhien estas amiko al kiu mi multe ŝuldas. Nun mi plezuras aldoni: "kaj ne nur lingve!" Vere admirinda estis ĉe li la kuraĝo antaŭ pluraj molestoj de la sorto, granda energio por affronti problemojn, kaj ne malpli granda delikato por ilin kontentige solvi. Kaj, super ĉio, nevenkebla humoro.

Al lia kara memoro, mi esprimas plej sinceran kaj admiran dankemon pro la ekzemplaj lecionoj.

Henri Vatré



Aŭtografo en Roterdamo . . . kie daŭre haveblas, ĉe la *Libroservo*, la verkaro de Gaston Waringhien

1887 kaj la sekvo...	36,60 gld.
Beletro, sed ne el katedro	36,60 gld.
Duonvoĉe	15,00 gld.
Eseoj 1	45,00 gld.
Francaj kanzonoj malnovaj kaj modernaj	33,60 gld.
Grand dictionnaire Espéranto-Français	36,90 gld.
Ĥimeroj, La / Chimères, Les	13,50 gld.
Kaj la ceter' - nur literaturo	36,00 gld.
Kantoj kaj romancoj	39,00 gld.
Klasika periodo, La	24,00 gld.
Li kaj ni	66,00 gld.
Lingvo kaj vivo	48,00 gld.
Maksimoj	16,80 gld.
Mezepoka periodo, La	28,80 gld.
Ni kaj ĝi	45,00 gld.
Parnasa gvidlibro	27,00 gld.
Plena Analiza Gramatiko de Esperanto	48,00 gld.
Plena Ilustrita Vortaro - Suplemento	12,90 gld.
PIV kun Suplemento	172,50 gld.
Plena Vortaro kun Suplemento	33,00 gld.
Renasanca periodo, La	22,80 gld.
Robaioj, La	12,00 gld.
Romantika periodo, La	27,90 gld.
Rubaiyat of Omar Khayyam in 30 languages	198,00 gld.
Trofeoj, La	9,00 gld.

De Freŭdo ĝis niaj informbudoj (2)

En la evoluo kiun mi skizis en una parto de mia artikolo (jan. '91), videblas du klaraj tendencoj.

Unue la pligraviĝo de la lingvo (voĉa kaj korpa). Ĉar ni okupiĝas pri planlingvo, ni havas ĉi-kampe netan avantaĝon. Ni pli kutimas analizi la enhavon de tio kion ni aŭdas kaj diras; ni supozeble pli facile malkovras metaforojn, dubsececon kaj kaŝitajn mesaĝojn.


La dua tendenco estas la ĉiam pli granda intereso pri la disvolvigo de la individuo. Nia tradicia socia koncepto pri sukcesa vivo ankoraŭ bazigaĝas ĉefe sur objektaj kriterioj: poentoj en la lernejo, diplomoj, posteno, posedo de domo, aŭto ktp. Saĝuloj jam de longe malkovris ke la homa feliceco proporcias al la eblecoj de individuo disvolvi siajn proprajn kapablojn: homo nedotita por lingvoj spertos pli grandan ĝuon se li, post multe da penado, sukcesos balbuti kun eksterlandano, ol poligloto kiu lernis sian okan lingvon. Feliceco en la psikologio kaj pedagogio oni nuntempe sisteme emfazas tiun ĉi saĝon.

Ĝi plej reliefigas en la doktrino kiun malkovris Richard Bandler kaj John Grinder. Ilia Neŭro-Lingvistika Programado (NLP) definitive rompis kun la tradicio de la psikanalizo. Por pravigi tion, Anthony Robbins i.a. komparas ĉi-lastan kun bonvola homo kiu provas konsoli vidvinon per ĉiutaga remaĉado de la tuta drama evento. La estajo de traŭmatoj pro nedigestitaj ŝokaj eventoj, precipe en la infanaĝo, restas ekster diskuto. Sed estas necese, neefika torturo rekonduki homojn al la rea kaj rea travivo de ili.

Bandler kaj Grinder simple anstataŭigas la traŭmatajn spertojn per pli plaĉaj. Ni perceptas amason da informoj, sed tamen konscias nur pri malmultaj el ili. Nia cerbo filtras la plimulton el niaj impresoj kaj havigas al ni bildon pri la realo. La aŭtoroj de NLP malkovris, ke ni povas mem ŝanĝi la filtradon, kaj krei etoson kiu plaĉas al ni kaj pligrandigas niajn eblecojn. Tiel individuo deprimita, fuŝema kaj senenergia povas, en kelkaj minutoj, ŝanĝi sin mem al energia, dinamisma sukcesulo. Tiamaniere ni povas en tre mallonga tempo pligrandigi niajn proprajn kapablojn kaj sekve nian vivĝuon.

Eble ankoraŭ pli grava estas ilia malkovro pri la sintakso de rilatoj kun

aliaj homoj. Mi klarigu tion ĉi per komparo. Ekzistas dotitaj, kreiĵaj kuiristoj, kiuj mem malkovras receptojn kaj kreas bongustegajn manĝaĵojn. Sed ĉiu ajn povas fari ion plaĉan, se li aŭ ŝi zorgas akurate la ingrediencojn, pesas la ekzaktajn kvantojn, kaj preparas ĉion laŭ la sinsekvo kiun priskribas bona kuirlibro. La homo, kiu



Estrarano pri Informado Ivo Durwael

sukcesas malkovri la "recepton" kiun alia homo uzas por filtri siajn impresojn de la ekstera mondo, povas krei mesaĝojn kiuj nepre estos akceptataj, sendepende de ties enhavo! Apliko videblas ĉiutage en moderna reklamo: pli gravas la formo de prezentado ol la enhavo de la reklammesaĝo. Reklamo povas direkti sin nur al homgrupo kun multaj similaj trajtoj. Sed kiu komplete regas la teknikon de NLP, povas akiri malfermitecon en la rilato kun iu ajn individuo. Evidente, tio postulas studadon kaj spertigon. Sed kiom da eblecoj ĝi malfermas por tiuj kiuj okupiĝas pri ekstera informado!

Konsistenco + kongruo = kontento

Tiu ĉi formulo resumas la esencon de NLP. Konsistenco estas la forto kiu kunigas molekulojn. Mi uzis tiun vorton en la figura sencu, por indiki nian bezonon je interna harmonio. Tro ofte ni perdas nian energion pro internaj kontraŭaj deziroj. Ni planas skribi gazetaran komunikon sed pro-

krastas ĝin plurfaje. Ni volus rebati artikolon sed forgesas tion. Aŭ ni tamen skribas leteron senpacience kaj volas rapide fini ĝin. Nur kiam ni entreprenas ion sen interna rezisto, ni uzas nian tutan potencialon de eblecoj. Estas pli bone (laŭeble) rezigni pri laboroj kiujn ni iel kontraŭvole akceptis. Tial ni, en la Informa Fako, strebas unue al pli da harmonio inter la kunlaborantaro antaŭ ol ni kuraĝas pensi pri komuna kampanjo.

Se konsistenco rilatas al nia interna harmonio, kongruo rilatas al la ekstera mondo. Se ni laboras, ni kutime fariĝas iom streĉitaj. Ni enŝaltas multajn filtrilojn kaj izolus nin en niajn proprajn strebojn. Sed eblas konscie percepti ankaŭ la ĉirkaŭaĵojn, la reagojn de niaj kolegoj, kunlaborantoj ktp. Ju pli ni restas konsciaj pri la impresoj de nia ĉirkaŭaĵo, des pli facile estas plenumi laboron kongruan kun la deziroj kaj aspiroj de la homoj ĉirkaŭ ni. Tiel ni, sen pli da penado kaj eluzo de energio, atingos multe pli belan, kontentigan rezulton. Kaj ni kontribuas al pli harmonia mondo. Kaj tio estis ĉe la origino de nia agado, ĉu ne?

La supra resuma superrigardo montras multajn eblojn por instrui kaj trejni la kunlaborantojn de la Informa Fako. Mi alvokas vin esplori la eblojn sur landa aŭ prefere plurlanda nivelo. Evidente, ni estas scivolaj pri la rezultoj de tiu ĉi esplorado.

Krome, la menciitaj ideoj ankaŭ inspiris min listigi kelkajn strategiajn principojn por plua agado pri informado.

1. Por esti fruktodona, nia agado havigu al ni la senton de persona disvolvigo kaj kontentigo. Nia kapitalo ne trovigas en banko sed en niaj cerboj.
2. Ni strebu al konkreteco en niaj celoj. Ju pli konkrete ni sukcesas bildigi kion ni celas atingi, des pli granda fariĝas la ŝanco de realigo.
3. Ni esploru ĉiujn eblecojn de klerigo kaj spertigo en la plej modernaj teknikoj de informado por disvolvi nin mem kaj por akiri pli kontentigan rezulton. Ni faru tion per legado, partopreno en staĝoj de neesperantistaj organizoj, kaj okazigo de diversnaciaj staĝoj por esperantistoj.
4. Tamen lernadi estas sensece se ĝi ne kondukas al pli da agado.
5. Ne necesas remalkovri la ovon de Kolumbo. Ni strebu al kolektado de kiom eble plej multaj informoj kaj al imitado de sukcesaj modeloj en kaj ekster la Esperanto-movado. La sciigo de bonaj kaj malbonaj spertoj al la Informa Fako restas

esenca parto de nia klopodo por pli efika agado.

- Antaŭ ol pensi pri ambiciaj kampanjoj, ni atingu generalan senton pri pli efika laboro en nia tradicia agado, ĉar sukceso ne dependas de nia ambicio sed de la kvalito de nia farita laboro. Nur kiam regas generala kontento pri la rezultoj de modestaj iniciatoj, ni estos pretaj por pli grandskalaj.
- La informado pri Esperanto ne estu nia celo en si mem. Per nia informado ni strebu kontentigi la bezonojn de tiuj homoj al kiuj ni direktas nin.
- Kvankam la mezureblaj informoj (nombro da informpetoj, nombro da gazet-elranĉaĵoj k.s.) estas gravaj, ni pensu ankaŭ pri subjektivaj kriterioj: ĉu ni sukcesis kontakti novan publikon, ĉu tiu ĉi publiko spertas kontentiĝon. La kvalito de nia laboro dependas de nia kapablo komuniki kun ĉia publiko.



- Se ni restas elastaj kaj malfermaj, ni povas krei triumfon el ĉiu ajn rezulto. Plej gravaj malsukcesoj povas plej multe instrui nin pri estonta agado. La plej sukcesaj homoj en la socio ofte estas homoj kiuj, antaŭ la sukcesoj, spertis lavangon da malsukcesoj, sed persistis.
- Ju pli motivitaj kaj konvinkitaj ni estas, des pli ĝisfunde ni eluzas niajn eblecojn.

*Ni havas multon por oferti . . .
sed kiel allogi la homojn?*



KONKURSO

Internacia Esperanto-Instituto en Hago anoncas konkurson por verkemaj esperantistoj. La celo de la konkurso estas verki internacie uzeblan tekston por 3-hora vidbendo kun 12 lecionoj por 15 minutoj. La teksto:

- estu taŭga por instruo al homoj en aĝo de 18 ĝis 30 jaroj;
- prezentu scenojn pri Esperanta vivo, ekz. pri kongresoj, E-ferioj, E-familioj, lingvaj problemoj (ekz. diverslingvaj najbaroj);
- estu en formo de dialogoj.

La teksto estu instrua *laŭ rekta metodo*, prezentanta al spektantoj la logikecon de la gramatiko, la simplan strukturon de la lingvo, kaj la eblojn de rapida komunikado per ĝi en aktualaj, interesaj, ofte spritaj situacioj, sen nepra studado de gramatikaj reguloj. La gramatiko estu limigita al la necesaj por simplaj konversacioj, surbaze de la formoj *-as, -is, -os kaj -u*, sen uzo de participaj formoj. La serio ne estu kompleta lingva kurso, sed pli *varb*-informa.

Kontribuojn bonvolu sendi, *plej laste la 31-an de decembro 1992* al IEI, Riouwstr. 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. La aŭtoro(j), kies verko(j)n oni elektos por filmi, ricevos monpremion en valoro de 300-800 nederlandaj guldenoj.

Por resti konsekvenca kun la enhavo de tiu ĉi artikolo, mi promesas respondi al ĉiuj viaj demandoj, komentoj kaj kritikoj, ĉu skribe, ĉu okaz de renkontiĝoj. Mi esperas je viaj reagoj.

Ivo Durwael
Estrarano pri Informado
(adreso en la kolofono)

Bibliografieto

(sinsekvo laŭ apero en la teksto de nur kelkaj furoraj verkoj de menciitaj aŭtoroj)
Abraham MASLOW

*The Farther Reaches of Human Nature
Towards a Psychology of Being*

ERIC BERNE

Games People Play

What do You Say After You Say Hello

Thomas A. HARRIS

I'm OK, You're OK (supozebla la plej populara libro pri Transakcia Analizo)

Thomas GORDON

Parent Effectiveness Training

PET in Action

Teachers Effectiveness Training

Leader Effectiveness Training

Desmond MORRIS

The Naked Ape

Manwatching

Intimate Behaviour

Wayne DYER

You'll See It When You Believe It

The Sky's the Limit

Pulling Your Own Strings

Richard BANDLER

Using Your Brain

Richard BANDLER kaj John GRINDER

Frogs into Princes

The Structure of Magic

Reframing

Anthony ROBBINS

Unlimited Power

Pacifiko:

Esperanto sub la kokosarboj

Imagu: 25-kilometra plaĝo el blanka sablo, fronte al smeralda verda laguno sur kiu malfermiĝas la arkoforma insulo. Fore, la intense blua oceano frakasigas kun blanka ŝaŭmo sur la koralarbarilono. Tiu paradizo estas Ouvéa, unu el la Nov-Kaledoniaj insuloj. Nov-Kaledonio estas franca teritorio perdita en la vasta suda Pacifiko, oriente de Aŭstralio, norde de Nov-Zelando. En tiu landeto kun 165 000 loĝantoj, nombriĝas ne malpli ol 37 lingvoj kaj dialektoj parolataj de la indiĝenaj kanakoj, krom la oficiala franca lingvo. Aldoniĝas lingvoj nur hejme parolataj de la minoritatoj: la vietnama, java, tahitia...

Mankis Esperanto. Laure Mansel, instruistino, kunportis la internacian lingvon el sia naskiĝa Francio kaj eniriĝis ĝin en sian lernejon kiel nedevigan klub-agadon. Tamen Nov-Kaledonio restis ĉiam blanka

makulo sur la verda mondmapo.

Nia mondvojaĝo kondukis nin al Nov-Kaledonio. Ekde 1985, ni jam vizitis multajn landojn, de la verda Irlando ĝis Ĉinio kaj Aŭstralio, trapasante Bulgarion, kie ni lernis Esperanton en Pisanica. Kiel en multaj aliaj landoj, ankaŭ en Nov-Kaledonio ni konigis la uzeblojn de la internacia lingvo pere de amaskomunikiloj: ni informis pere de dek minutoj ĉe televido en populara kultura elsendo, unu horo ĉe la ŝtata radio, kaj artikolo en la loka ĵurnalo. Dudeko da personoj ĉeestis la tiel anoncitan kunvenon, kaj dek kvin el ili eksekvis entuziasme la kurson kiun ni malfermis – inter ili, la ĵurnalisto kiu intervjuis nin ĉe la radio!

Ni devas nun forlasi Nov-Kaledonion, postlasante komencantojn kun bonaj lingvobazoj. Ili fondis asocion



Nov-Kaledonio: ne plu blanka makulo

kaj daŭrigos la lernadon grupe. Se vi volas sendi al ili poŝtkarton kun kuraĝiga saluto, aŭ se viaj paŝoj kondukas vin al tiu "insulo de eterna printempo", ne hezitu kontakti ilin. Kvankam ili ankoraŭ ne aperis en Pasporta Servo, vojaĝemuloj povas kontakti la peranton: Anne-Marie Fontaine, 24 rue du Général Sarrail, Mont Coffyn, Nouméa, Nov-Kaledonio.

Maryvonne kaj Bruno Robineau
(Francio)

Faka agado:

Lerni turismon per Esperanto

Laŭ invito de Andreo Grzegowski, la direktoro de Esperantotur, mi gvidis la unuajn etapojn de naŭmonata "Internacia Studumo pri Turismo", en Bydgoszcz, Pollando.

Oni esperis ke venos lernantoj ankaŭ el aliaj landoj, sed ĉiuj en tiu ĉi unua grupo estas poloj, ĉefe el Bydgoszcz kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La partoprenantoj nombras inter 25 kaj 30, preskaŭ ĉiuj 20-jaraj.

Grava elemento de la studumo estas la lernado de lingvoj. Komencis la kurson tri semajnoj da Esperanto, kvin tagojn semajne po kvar horoj. Sekvis ekskurso al Litovio kaj renkontiĝo kun lokaj esperantistoj. Poste mi gvidis trisemajnan kurson de la angla; sekvis ekskurso al Ukrainio (Lvovo kaj Kievo), refoje por kontakti esperantistojn.

La venontaj kursoj temos pri la franca, germana, pola, rusa kaj litova, interrompataj de plujaj ekskursoj kaj pollingvaj kursoj pri specife turismaj temoj. Eble la plej grava vizito okazos en marto, kiam la lernantoj ĉeestos la

turisman konferencan en Budapeŝto, kaj de tie vojaĝos al Vieno, kie ili trejniĝos por mem gvidi busajn ekskursojn al kaj tra la aŭstria ĉefurbo okaze de la UK.

La sukcesintoj ricevos diplomon agnoskitan de la pola ŝtato kaj povos dungiĝi ĉe turisma kompanio aŭ eble lanci propran agentejon.

Konkludoj

Neniam antaŭe okazis io simila, kaj laŭdire eĉ multaj esperantistoj skeptikis. Estas tro frue por fari konkludojn, kaj ĉiu eksperimento estas risko – sed ĝin kelkaj impresoj.

Se oni bezonus pruvon pri la relativa facileco de Esperanto, oni trovus ĝin ĉi tie. Nur kelkaj el la lernantoj iom konis la lingvon antaŭe, kaj mi povus nur tre pene komuniki kun ili en la pola. La tutan tempon mi parolis Esperante, enkondukante ĉiutage zorge elektitajn gramatikajn elementojn; afiksajn kaj vortostokojn. Je la fino de la tri semajnoj ili povis kompreni preskaŭ ĉion (ili ridis ĝustamente pri serĉoj!), kaj

multaj el ili povis eĉ iniciati liberan konversacion. Preskaŭ nescepte tiu parto de la kurso estis sukceso, kaj la entuziasmo de la lernantoj por Esperanto estas tre kontentiga.

Pri la angla la atingoj estis malpli kontentigaj. Jam dekomence estis problemo, ke eble du trionoj de la klaso jam studis la lingvon unu, du aŭ kvar jarojn. Kiel kombini ilin kun komencantoj? Krome, kiujn fragmentojn de la angla oni instruu en tri semajnoj? Ebla respondo estus: nur tiajn esprimojn, kiujn bezonas turisma gvidisto. Hm, iom papagece...

Esperanto estas evidente la plej grava lingvo de la studumo. Ĉu estas konsilinde proponi tiom da aliaj lingvoj po nur tri semajnoj? Nu, ni devas atendi.

Alia parto de la studumo estas vesperaj prelegoj pri diversaj temoj. Laŭplane lokaj esperantistoj ĉeestus kaj helpus enkonduki la lernantojn en la movadon. Por diversaj kialoj tiu parto ĝis nun pli-malpli malsukcesis. Se oni eksperimentas...

Se estontece la studumo daŭros kaj la partoprenantoj venos el diversaj landoj, ekestos impona esperantlingva lernejo. Ĉiukaze mi kontentas, ke mi povis partopreni en la esperiaĵaj unuaj etapoj.

Trevor Steele (Aŭstralio)
el *Heroldo de Esperanto*

Merkato difinas ankaŭ Svisan Radion Internacian

Lastatempe diversaj onidiroj pri la malperdo de Esperanto el la programoj de Svisa Radio Internacia (SRI, Berno) maltrankviligis ne nur la produktistojn de la elsendoj, sed ankaŭ multajn klientojn, t.e. aŭskultantojn de tiu radiostacio. Nun ni scias: Esperanto ja malaperos de la kurt-ondoj, sed estas antaŭvidite konservi ĝin kiel "produkt-lingvon" de SRI, tamen en alia - eble eĉ pli alloga - formo. Necesas iom rakonti la historion kaj la aktualan fonon de ĉio tio.

La Esperanto-disaŭdigoj de Svisa Radio Internacia komenciĝis vintre de 1946/47. Tiam Edmond Privat (1889-1962), mem kunfondinto de Radio Genevo, ricevis la komision ekprodukti elsendojn en la internacia lingvo. Tre



Edmond Privat

bonvena por la nova SRI-radio-eksperimento montriĝis ankaŭ la 32-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu en 1947 okazis en Berno. Produktiĉiutagan kongresraporton oni petis de d-ro Arthur Baur, tiam profesia ĵurnalisto. La reagoj al tiu provo estis tiom kuraĝigaj, ke Baur ricevis la taskon redakti, apud Privat, pluajn disaŭdigojn ekde oktobro 1947 en la tempodaŭro de po kvin minutoj. Ekde tiam Esperanto elsendiĝis regule ĝis hodiaŭ (kun escepto en 1964/65, kiam la direkcio de SRI anoncis ŝparpremon). Post la morto de Privat en 1962 liaj elsendoj estis transprenitaj de Claude Gacond (1931-), kiu kun sia edzino Andrée prizorgis la ĵaŭdajn elsendojn, dum Baur, apogata de sia edzino Heidi, daŭrigis la lundan programon. En 1986 aliĝis al la kvaropo Andy Künzli (1962-), kiu pretiĝis pli kaj pli da disaŭdigoj (sabataj) kun plej diversa enhavo, lastatempe precipe svisa. Fine de 1991, Künzli estis nomumita posteulo de Baur, kiu meritiplene ĉesigis sian longan funkcion ĉe SRI (vd. *Esperanto*, julio-aŭgusto 1991, p. 156).

Ankaŭ ĉe SRI oni opinias ke la tradicio estas bona, sed SRI, kiel multaj aliaj entreprenoj en Svislando, devas draste limigi sian buĝeton, ĉar la svisa ŝtato

forstrekas 20% de la subvencioj. Tial ĝi restrukturis siajn programojn, laŭ jenaj prioritatoj: la plej grava tasko de SRI estos servi la svisojn vivantajn en eksterlando, en la dua vivo sekvas la tasko "renomigi Svislandon en eksterlando", kaj kiel trian taskon SRI antaŭvidas la "dialogon kun eksterlando". Alivorte: SRI ne havos tiom da rimedoj kaj eblecoj, kaj krom tio ĝi dependos de la svisa politiko mem. Se la svisoj decidis malfermi



Arthur Baur

la landon al Eŭropo kaj al la mondo, tiukaze SRI eble ludos pli gravan rolon. Se ili decidis inverse, tiam SRI restos neglektindaĵo.

Por la lingvopolitiko de SRI, kiu ĝis nun elsendis en naŭ lingvoj, tio signifas i.a. rezignon pri la portugala, kiu ŝajne perdis sian allogon en okaziglingvaj regionoj. Kion pri Esperanto? Ĝi ja ne perdus sian aktualecon kaj allogon ĉe la esperantistaro - eĉ tute male - sed ankaŭ ĝi malaperu de la kurt-ondoj kaj estu pelita en la t.n. "diversigan sektoron", kiel la SRI-planistoj nomas tiun kategorion de programoj. Tiu ĉi sektoro antaŭvidas la produktadon de laŭbezonaĵ radioprogramoj.

Se ni bazigas sur la supozo ke Esperanto estos daŭre uzata de SRI, tiukaze mi opinias ke ĝin savis tri ĉefaj faktoroj: a) la konscio de la direktoro



Claude Gacond

de SRI pri la signifo de la internacia lingvo kaj la bonvolo de SRI konservi tiun "belan, kulturan ekskluzivaĵon" (laŭ direktoro R. Oppenheim); b) la fidelaj aŭskultantoj kaj respondantoj (3% el la tuta SRI-korespondajaro koncernas Esperanton. Kompare kun la aliaj lingvoj de SRI, kiu ĝis nun povis disponi multe pli ampleksan disaŭdigo-tempon ol Esperanto, tiu ĉi cifero estas tre alta);

c) la kompetenteco de la Esperanto-produktistoj (Oppenheim: "ili vere havas fakan scipovon") kaj la trafa enhavo de iliaj elsendoj (kiu cetere tute konformas al la komiso donita de la svisa registaro). Krome hezita certe ankaŭ detala "defenda" raporto de Gacond kaj Künzli, kiu trafis pravigis la ĝisnunan ekzistadon de la Esperanto-programo kaj la neceson daŭrigi la disaŭdigojn.

Kio do restos de Esperanto? La SRI-planistoj kaj la Esperanto-redaktoroj estas kune ellaborantaj novan koncepton, kies ĉefajn trajtojn eblas pri-skribi jene: la Esperanto-produktoj, kiuj cetere enhave ne tro sangiĝu (devos okazi vera koncentriĝo sur svisaj temoj), estonte pli celtrafe ol ĝis nun direktiĝu al la publiko kiu deziras aŭdi ilin. Unuopuloj kaj Esperanto-grupoj havos la eblon akiri kasedojn (laŭ kostokovra maniero, eble en formo de abono) kun monata programo, kaj la Esperanto-produktoj estos perataj ankaŭ al aliaj radiostacioj kiuj disaŭdigas en la internacia lingvo, aŭ al regionaj (privataj) radiostacioj kiuj pretus transpreni kompletajn Esperanto-programojn aŭ partojn de ili. Tiel, la esperantistoj ricevas la eblon aŭdi nin tra siaj lokaj radiostacioj. La SRI-planistoj jam informis, ke areo da triaj radiostacioj anoncis sian intereson kunlabori kun SRI.

Certe, la perdo de la svisa kurt-ondo por Esperanto estas bedaŭrinda novaĵo. Samtempe mi kredas, ke la nova koncepto, kiu donos pli fortan pezon al la kasedoservo, malfermos ankaŭ novajn eblojn kaj vastigos la Esperanto-publikon, kiu ŝatus posedi konserveblajn sondokumentojn prezentindajn en Esperanto-societoj.

Mi esperas ke ni trovos solvon akcepteblan por la Esperanto-publiko. Tio dependos de la intereso flanke de ĝi. Se la reagoj kaj mendoj montriĝos tro magraj, malaperos verŝajne la lasta escepto konservi Esperanton ĉe SRI. Pliajn komunikaĵojn kaj la konkretan oferton de SRI ni publikigos en la Esperanto-gazetaro. Interesataj regule ricevi kasedojn jam skribu al: Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando. Ni antaŭgustas ricevi viajn komentojn, sugestojn, kaj eble ankaŭ mendojn.

Andy E. Künzli (Svislando)



Andy Künzli

Ekspérimenta projekto pri alfabetigo en Esperanto

Ĉu Esperanto estas uzebla kiel lingvo de alfabetigo? Ĉu eblas ligi alfabetigon kun internacia edukado? Ĉu Esperanto povas helpi en la konservado de loka kulturo?

Surbaze de tiuj ĉi demandoj kaj afrika iniciato, TEJO decidis lanĉi eksperimentan projekton pri alfabetigo. La projekto daŭros ses monatojn en 1993 kaj okazos en Togolando, Afriko. Por realigi la projekton, TEJO ekkontaktas kun kelkaj internaciaj volontulaj organizoj kaj togolandaj asocioj. Krome, KKIIVS (Kunordiga Komitato de Internacia Volontula Servo) akceptis la projekton en sian programon. TEJO ankaŭ petas Uneskon pri financa subteno.

La fono estas konata fakto: etaj, lokaj kulturoj kaj lingvoj malaperas, kaj precipe gejunuloj malmulte konas kaj agnoskas la valoron de sia kultura heredaĵo. Por kontraŭbatali la malaperon i.a. Unesko lanĉas konstante projektojn de kultura konservado kaj revivigo de lokaj kutimoj. Kultura heredaĵo, laŭ ĝi difino, estas ne nur malnovaj konstruaĵoj, sed ankaŭ vivanta, spirita heredaĵo.

Estas evidente ke Esperanto bone enplektigas en tiajn projektojn. Esperanto ne kunportas la koloniismon-imperismon de naciaj lingvoj, kaj Esperanto ja ne celas forpuŝi aŭ subpremi iun alian kulturon. Male,

Esperanto estas bona ilo por konsiigi gejunulojn pri ilia kulturo. Kiom bona ĝi estas, tion montras la rezulto de la projekto.

En la eksperimento partoprenos, krom instruisto, 50 gejunuloj analfabetaj 11- ĝis 14-jaraj. Ili estos el



kampara regiono kaj, kadre de alia projekto, ili samtempe lernos sian propran lingvon kaj kelkajn bazajn fakojn. Kvin tagojn semajne, du horojn tage, ili lernos Esperanton (legi kaj skribi, ĉefe). Jam komence ili havas la eblecon kontakti aliajn junularajn grupojn en aliaj landoj de Afriko kaj la cetera mondo. Ni volas speciale emfazi regionan kunlaboron, por ke post la projekto ekestu plua kunlaboro kaj aktivigado reciproka. La lernantoj post ses monatoj supozeble scios iom legi kaj skribi Esperanton. Sed pli grave estas ke ilia sinteno al la ekstera mondo

ŝanĝiĝu: ili havu pli da memfido, ili komprenu iomete pri la ekstera mondo, ili havu pli grandan toleremon al aliaj etnaj grupoj, kaj ĉefe, ili havu la emon plu lerni. Per Esperanto ili havas eblecon prezenti sian kulturon kaj ekkoni aliajn mondkale. La lernantoj konsciu pri la valoro de la propra kulturo kaj sciu kiel ĝin konservi kaj evoligi.

Se Esperanto utilos kaj rapidigos la lernadon de la propra lingvo kaj generale helpas en la paralela projekto (ekzistas kontrolgrupo kiu ne lernas Esperanton), ni povos konsideri la projekton sukcesa. Se la lernantoj iĝos pli toleremaj kaj emos lerni pli, ĝi eĉ estos tre sukcesa. En tiu kazo ni povos ripeti la eksperimenton en aliaj partoj de la mondo.

La projekto ankoraŭ estas planata kaj la unuaj paŝoj faritaj. Sed daŭros ankoraŭ ĝis ni estos pretaj. Se vi interesiĝas pri kunlaboro aŭ havas kometojn aŭ proponojn, bonvolu skribi al la suba adreso.

Se vi instruas grupon de 11- ĝis 14-jaraj gejunuloj, vi povas kunlabori. Sendu vian adreson kaj priskribon pri via grupo al la adreso sube.

Se vi estas juna (aŭ sentas vin tia), havas sperton pri instruado, volas fari ion novan, ŝatas defiojn, povas pasigi duonan jaron en Afriko, posedas la francan almenaŭ iomete, estas kunlaborema, volas instrui Esperanton kiel alfabetigan lingvon... vi estas la persono kiun ni serĉas! Skribu pri vi mem al:

Sabira Ståhlberg
Baggbölevägen 9 A 3
SF-00630 Helsingfors
Finlando


Studa, stimula somero en Svislando

En januaro ni raportis ke Internacia Kultura Servo ne fermis siajn pordojn en militanta Kroatio. En la paca Svislando, vivas kaj viglas ankaŭ Kultura Centro Esperantista, post la periodo de restrukturado en 1991. Alain Favre, respondeculo pri la someraj programoj, sciigas nin pri rare bunta vario de aranĝoj.

Satantoj de la Esperanto-kulturo povus dediĉi siajn tutajn julion kaj aŭguston al ripozaj klerigo: Charrière instruos pri higieno kaj dieto; Chmielik debatigos pri la estonteco de Orienta Eŭropo kaj tradukigos por *Svisa Antologio*; Degoud prezentos la idealojn de Zamenhof; Dubourg-Glatigny klarigos modernan arton;

Ertl analizos nunajn lingvo- kaj stil-konceptojn; Favre kolektos fungojn; Gacond proponos riĉan instru-metodaron; Galor aplikos sociologion al nia movado; Koutny perfektigos instruistojn; Lagrange konatigos la personecon de Raymond Schwartz; Popov enkondukos en la eks-sovetian kantotradicion; Silber projekcios Esperantan kinarton; Stimec rakontos pri Orienta Azio; kaj fine, Vaha pritraktos Esperanto-familiojn kaj prelegos pri la historio de priesperanta lingvistiko.

Kiuj nur komencas konatiĝi kun Esperanto, tiuj povos partopreni lingvokursojn en la tuta jaro. Ankaŭ daŭre okazas Esperantaj semajnfinoj. Mendu la ĝeneralan programon ĉe



Kultura Centro Esperantista, Pf. 779, 2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Instruado:

Lud-metodiki per IKI

De la 9-a ĝis la 11-a de oktobro ĉi-jare okazos, je la dua fojo, evento gravega por la sudamerika movado. Temas pri la Interlanda Konferenco pri Instruado (IKI), kiu efektiviĝas ĉiun duan jaron alterne en Argentino kaj en Brazilo. La ĉi-jara realiĝos en la urbo Presidencia Roque Sáenz Peña, provinco Chaco, Argentino, pri la temo "Ludoj kaj kanzonoj en la Esperanto-instruado".

Temas pri unika okazo ne nur por klerigo pri ludaj instrumentoj, sed ankaŭ por interŝanĝo de spertoj inter du landoj kiuj havas tradiciajn movadojn. Aparte riĉaj povas esti la interkonsiladoj tie, ĉar tiuj du landoj ne parolas saman lingvon, kvankam lingvojn tute parencajn: la hispanan kaj portugalan. Krome, la arango prezentas unikajn kadron por plej diversaj projektoj kaj eksperimentoj: invito de instruistoj de unu lando en la alian, aparte kiam temas pri rektmetoda instruado, aŭ dumferiaj interŝanĝoj de lernogrupoj gastantaj ĉe esperantistoj. Nu, kio nova en tio? Por Eŭropo tio ne estas revolucia eltrovo, sed oni konsideru ke tra tuta Ameriko oni ne spertas tiom la lingvan problemon

kiom en Eŭropo. Tuta Latinameriko jam parolas siajn du internaciajn lingvojn, kies diferencetojn oni sufiĉe sukcese likas per aspeca piĝino, "portuñol" (portuñol), mikso de hispana kaj portugala. Kaj la situacio ne estas alia en Norda Ameriko, kiel ni ĉiuj scias.

La nova iniciato de Argentino kaj Brazilo gravas do, ĉar jen estas du landoj samregionaj kun ne tute sama lingvo, inter kiuj sekve traviaĝas la lernado de Esperanto laŭ ties tradicia argumento. Tamen IKI estas trafa okazo ankaŭ por eltrovi verajn motivojn, kiujn oferti al lernantoj en kontinento kie la hegemonio de ĉef-lingvoj estas tiel forta.

Antaŭ du jaroj, dum la unua fojo de tiu interlanda sperto (Kuritiba, Brazilo), la arango montriĝis tre sukcesa: ĝin partoprenis trideko da E-instruistoj, ĉefe el Brazilo. Nun, kiam IKI havos sian lokon en Argentino, esperble ĝi ricevos saman akcepton flankde de argentinanoj. IKI certe helpas plialtigi la kvaliton de la E-instruado en Sudameriko.

Interesitoj kaj eblaj prelegontoj sin turnu al: 2-a Interlanda Konferenco pri Instruado, Jugoslavia y Esperanto, RA-3700 Peia. R. Sáenz Peña (Cho.), Argentino.

Francisco L. Veuthey
(Nederlando)

Invito al la ILEI-Gimnazio

Karaj Gejunuloj 13- ĝis 16-jaraj!

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) invitas vin partopreni Internacian Soman Gimnazian Semajnon (ILEI-Gimnazion) de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto 1992 en Bratislava (Ĉeĥoslovakio).


En la gimnazia semajno vi povos:

- *interamikiĝi* kun geknaboj el plej diversaj landoj de la mondo;
 - ĝui kelkajn *interesajn*, ne-lernecajn *studobrojn* (nur 30-minutajn!) pri E-lingvo, E-literaturo, matematiko, geografo, muziko, sporto kaj arto, *lernante kuriozaĵojn*;
 - *ekskursi*, viziti vidindaĵojn de la regiono, ludi, amuziĝi; kaj
 - *mem proponi*, iniciati aŭ eĉ gvidi kelkajn programojn.
- Ankaŭ la *instruistaro* estas internacia: ges-roj R. kaj F-G. Rössler, Germanio; s-ro S. MacGill, Novzlando/Hungario; s-ro P. Arnaudov, Bulgario; s-ro P. Smid, Ĉeĥoslovakio; kaj aliaj bonaj fakuloj.

Vi estas *bonvena en la ILEI-Gimnazio, se:*

- vi havas aĝon inter 13 kaj 16 jaroj (je la dato de la gimnazia semajno);
- vi bone parolas la lingvon Esperanto (kie ajn vi lernis aŭ lernas ĝin);
- vi volonte submetiĝas al la disciplino de la Gimnazio;
- viaj gepatroj (aŭ iu societo k.s.) entreprenas pagi la partoprenkotizon kaj la vojaĝon.

Petu aliĝilon, resendotan ĝis la 30-a de aprilo, de la gimnazia direktorino: s-ino BARCSAY Zsuzsa (prononcu: barĉai), Bem rakparto 25/B, H-1011 Budapeŝt, Hungario.



Alvoko

Propralingvaj apartaĵoj ("idiotismoj") konsistigas en la internacia lingvo seriozan danĝeron, se ni volas gardi la internaciecan, neutralan karakteron de la lingvo. Internaciaj lernolibroj devas atentigi pri tiuj influoj kaj danĝeroj, kiuj devas troviĝi ankaŭ en internacia metodologia konsilaro. Tial mi celas verki studojn pri la etmolvigaj influoj en Esperanto, kaj lanĉas alvokon al interesitaj fakuloj en ĉiuj landoj por ricevi respondon al jenaj demandoj:

1. Ĉu ekzistas specifaj influoj de via lingvo en la lernado kaj uzo de Esperanto (akcento, prononco, vort- kaj frazkonstruo, ktp)?
2. Kiajn apartaĵojn vi konstatas ĉe alilandaj esperantistoj laŭ-lingve?
3. Kiuj estas la malfacilaĵoj kiujn spertas uzantoj de via lingvo por lerni kaj regi Esperanton?
4. Ĉu ekzistas artikoloj, studoj, disertacioj pri tiuj problemoj rilate al via lingvo? Se jes, bonvolu komuniki ilin al mi (eventualajn kostojn mi volonte repagos). Mi anticipu dankas pro via kunlaboro.

Edward Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout, Belgio

Nur rektamete kaj neflankigante...

Pro kio oni instruas? Kiu lernomaterialo jam ekzistas? Kio mankas por pli efika instruado? Ĉu kompententas la instruistaro? Kien post la kurso? Kion la lokaj kluboj povas fari? Kion ili devas atendi de superaj instancoj?

Jen demandoj kiuj, fakte, koncernas rekte la disvastiĝon de Esperanto ĉie en la mondo. Tiel formulis ilin la Kvara Laborkunsido de Nordorientaj Esperanto-Asocioj, okazinta de la 15a ĝis la 17a de novembro 1991 en la brazila urbo Fortaleza. Instigite de tiuj demandsignoj, 25 brazilaj aktivuloj identigis jenajn problemojn de la instruado en la regiono:

– mankas bonaj kaj (lingve, metode) kompetentaj instruistoj, ĉar ne okazas kritika selekto de ili. Mankas bonaj porinstruistaj kursoj;

– mankas organiziteco en la asocioj kaj grupoj;

– oni subkonscie (ĉu komplekso pri malpivaloreco?) timas postuli pagon por la instruado de Esperanto, kvazaŭ ĝi ne estus egalrajta al aliaj fremdaj lingvoj;

– mankas taŭge modernaj metodoj kaj lerniloj, mankas bonaj daŭrigaj kaj superaj kursoj.

Oni rapide konstatas ke la problemoj affrontataj ne estas nure brazilaj... "Manko" ja estas ŝlosila koncepto en nia movado, kaj multajn mankojn ne eblas rapide forigi. Pri la unuaj tri problemaroj, la Laborkunsido rekomendis ke instruistoj submetiĝu al ILEI-kaj aliaj ekzamenoj kaj partoprenu en la porinstruista seminario, kiu anstataŭos la Kvinan Laborkunsidon en oktobro 1992.

Sed plej detala analizo estis donata, kvare, al komparo de la lerniloj uzataj en Brazilo, laŭ jenaj kriterioj: a) ĉu rekta aŭ gramatika metodo; b) ĉu baza, meza aŭ supera; ĉu ĝi havas c) ekzerckokajeron, d) gvidlibron por instruisto, e) testojn, f) helpmaterialojn; kiajn g) vort-radikojn kaj h) gramatikajn elementojn ĝi uzas; i) ĉu ĝi uzas alian lingvon; j) aspekto; k) kosto; kaj l) rezultoj laŭ enklasa instruado.

Montriĝis ke ekzistas granda kvanto da bazaj lernolibroj en Brazilo, sed – kun raraj esceptoj – ili ne havas sinsekvon por la daŭriga kaj supera niveloj. Tro multaj el ili sekvas la "gramatikan metodon", kiu favoras la pasivan konon de la lingvo. La aŭtoroj emas superatki la facilecon de Esperanto, kaj tial enŝtopas tro da lernendaĵo kun maltrao da ekzercoj. La aspekto de la lernilo estas plejparte maldomerna kaj mallogika, senkolora kaj senbildita. Tio kondukas al subkonscia senvalorigo de Esperanto.

En medio kie Esperanto ne estas rigardata kiel profitdona lernaĵo kaj apenaŭ iu apogas ĝin, estas des pli grave instrui ĝin moderne – konstatas la kunsidintoj. La instruado nepre estu gramatika, ĉar tiu estas aparte facila parto de Esperanto, sed sen la "filologia" balasto de la tradiciaj metodoj. La kurso prefere instigu al tuj parola uzado de la lingvo, al memstara problemolsolado kaj favoru pli la inteligentolvo al la memoron. Alia lingvo ne estu principo evitata, sed uzata nur en pleja neceso. Ĉial ĉi, plej inda ŝajnas la uzo de la Cseh-metodo kaj de la libro *Baza Cseh-Kurso*.

Laste aperis...



Amara pano. József Darvas. El la hungara trad. Ladislao Somlai. København: Dana Laborista Esperanto-Asocio, sen jarindiko [1957]. 112p. 21cm. Romano pri malriĉaj kamparanoj, en esperantigo de fekunda tradukisto de la budapeŝta skolo. 3,60 gld.

Buton-milito. La. Louis Pergaud. Post-parolo de Reinhard Haupenthal. El la franca trad. Roger Bernard. Saarbrücken: Iltis, 1991. 198p. ISBN 3 927613 18 5. 21cm. Klasika franca romano (1912) kiu rakontas freŝe kaj malprude pri la batalado inter infanoj el du najbaraj vilaĝoj en la montaro Juraso. 52,20 gld.



De mav' estos neniam sat! Marcialo. El la latina trad. Gerrit Berveling. Breda: VoKo, 1991. 20p. 21cm. "Ekzempla ero" el la pretiĝanta Antologio Latina: morde satiraj poemoj de la plej klasika majstro de la epigramo. 4,20 gld.

Dek rakontoj el Vieno. Walter Klag k. a. Vieno: Klag, 1991. 32p. ISBN 3 901211 04 7. 21cm. Ĉerpajoj el la riĉa historio de nia ĉi-jara kongresuro. 4,80 gld.

Diverskolora bukedeto (1941). El div. lingvoj trad. Francisco Valdomiro Lorenz. Rio: Federação Espirita Brasileira, 1987 (2-a eld.), 160p. 18cm. Poemoj el 40 lingvoj, plis ses originalaj de Lorenz. 9,30 gld.

Entretenistaj strategioj. Priskribo de la entreprenoj. Werner Bormann. Hamburgo: 1991. 64p. 21cm. Studmaterialo por kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj. 5,10 gld.

Esperanto – das interkulturelle Erlebnis. Erfahrungen eines jungen Menschen mit der Internationalen Sprache. Ulrich Matthias. Edingen-Neckarhausen: la aŭtoro, 1991. 126p. 21cm. Persononta rakonto pri la interkulturaj spertoj pere de Esperanto, fare de la aŭtoro de la romano *Fajron sentas mi interne*. 20,40 gld.

Esperanto, la lingvo de la tera epoko. Doi Ĉieko. En la japana. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1991. 216p. ISBN 4 930785 33 2. 18cm. Enkonduko al la interkulturiga problemaro; historio de Esperanto kaj ties movado; lingva memlernilo kun vortareto. 22,50 gld.

Etimologio vortaro pragmata de Esperanto. Nemallongiga eldono. Yamasaki Seiĉō. Tokio: Libroteko Tokio, 1991. 250p. 26cm. Kun kapvortaro multe pli abunda ol tiu de la eldono en 1990, la

verko ĉefe utilas por komprenigi la etimologiajn konstru-principojn de la Esperanta radiko. 48,90 gld.

Falsaj amikoj. Schwierigkeiten im Wortschatz Esperanto-Deutsch. Stefan Maul. Vieno: Pro Esperanto, 1992. 26p. 21cm. Listo de ĉ. 600 Esperantaj vortoj forme similaj al alisignitaj germanaj vortoj, kun korekta germana traduko por la unuaj kaj Esperanto por ĉi-lastaj. 9,60 gld.

Fedra. Jean Racine. El la franca trad. Georges Lagrange. Paris: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1991. 76p. ISBN 0775 7698. 21cm. Klasika versa dramo, pri helena temo, el 1677. 9,90 gld.

Fundamento de Esperanto. L. L. Zamenhof. Pisa: Edistudio, 1991 (10-a eld.). 355p. ISBN 88 7036 046 6. 22cm. Bind. La fundamenta gramatiko, ekzercoj kaj universala vortaro, en la lingvoj franca, angla, germana, rusa, pola, kun enkonduko kaj lingvaj rimarkoj de A. Albut. 27,00 gld.



Iŝmael Gomes Braga. Zêus Wantuil. Trad. el la portugala. Rio: Federação Espirita Brasileira, 1971. 41p. 18cm. Biobibliografieto de spiritisma Esperantopioniro, kies 100-an naskiĝdat-revenon ni rememoris en 1991. 6,60 gld.

Kalendaro de internacionale taal Esperanto grenzenloos begrip. Heemskerk: BONKARAKTERA, 1991. 28p. 30cm. "Ĉiutaga kurso por fariĝi monddivitano": baza lingvomaterialo dismetita sur monataj kalendarpaĝoj. Taŭga ne nur por 1992. 9,00 gld.

Kiu posedas Danion? Analizo de potenc-rilatoj en la ekonomia vivo kaj trastudo de privataj fondusoj. Lennart Weber. El la franca trad. Betty Larsen. København: Dana Laborista Esperanto-Asocio, 1989. 46p. ISBN 87 983286 0 3. 24cm. Studo pri la posed-strukturo de la ekonomia kaj industria vivo en Danio. 12,00 gld.

Komputila Rondo. Adresaro 1991/92. Red. Jürgen Wulff. Hamburgo: KompRo, 1992. 34p. 21cm. Adresoj de pli ol cent komputilantoj el 25 landoj, laŭ stato de jan. 1992. 5,10 gld.

Ludovikologia dokumentaro Tókyo. Diversaj vortaroj kaj lernolibroj. V. J. Ludovikito, 1991. 532p. 21cm. Ebleniamen kompletigitaj necesaj aldonoj al la PVZ. Kolekto 5. Lernolibroj por germanoj, rusoj,

francoj kaj svedoj; vortaretoj hebrea, sveda kaj estona. 57,00 gld.

Manifesto por nova Eŭropo – ekologia, aperta, sociala. El la germana trad. Oswald Hasselbauer. Basel: TANEF, sen jarindiko [1991]. 16p. 21cm. Pri naturamikoj kaj iliaj celoj. 3,00 gld.

Monografio pri konjunkcioj. Kenji Ossaka. Tōkyō: Japana Esperanto-Instituto, 1990. 144p. 21cm. 18,00 gld.

Nekrokodilu plu! Parolu Esperanton. Enrique Kohel. Sen bibliografaj indikoj: 46p. 22cm. Konversacia libro por elementaj kursoj. 13,50 gld.

Paroloj al miaj gefiloj. Walter Francini. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, 1978. 80p. 19cm. Dulingva resumeto de la spiritismaj konvinkoj de la aŭtoro de *Esperanto sen antaŭjuĝoj*. 4,20 gld.

Pri felicia vivado. Seneko. El la latina trad. István Ertl. Breda: VoKo, 1991. 36p. 21cm. Traktajo elmentata la opinioj de stoikisto pri felicia vivo, t.e. "sekvioĉbei la naturon". 4,80 gld.

Speciala premio. Div. aŭtoroj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1991. 118p. ISBN 7 5052 0036 4. 18cm. Dudek ok mikronevoloj pri ĉiutaga vivo en Ĉinio. 3,30 gld.

Unu aŭ nul. La mondo aŭ estos tutmondista aŭ ne plu estos (1983). Guy Marchand. El la franca trad. Heradanto. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste, 1991 (2-a eld.). 118p. 21cm. Fundamentoj de tutmondismo. 12,00 gld.

Vortoj. A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1992. 102p. ISBN 950 43 3895 X. 17cm. Filozofiaj, humuraĵoj, moralajoj. 9,00 gld.

DIVERSAĴO

Stelo-monero. Diametro 2 cm, diko 1,2 mm, pezo 3,0 gm. 12,60 gld.

ABONSERVO

Aldoniĝas al la listo de revuoj perataj de la Libroservo en 1992:

Ateismo	25,00 gld.
Norda prismo	24,00 gld.
Vjetnamio	24,00 gld.

Ŝanĝoj de tarifoj por 1992 kompare kun la listo en *Esperanto*, novembro 1991:

	de	al
<i>Iltis-Forumo</i>	27,00	34,00 gld.
<i>Sennaculo</i>	54,00	56,00 gld.
<i>Sennacia revuo</i>	13,50	14,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA. Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insingnoj k. s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendoj!

La kantlibreto **Mielaj kaj pikaĵoj kanzonoj** de J. Manceau (vd. "Laste aperis", nov. 1991) ne estas "mimeo", sed fotostate realigitaj; per tiu procedo oni atingas multe pli bonan kvaliton ol per mimeografa tekniko. Pardonu la eraron.

Kalendaro 1992



Por listo de turismaj centroj k.s., vd. la januaran numeron, p. 16.


aprilo

3-5: **Antaŭ-Paska Renkontiĝo**, Burg, Spree-arbaro, Orienta Germanio (Esperanto-Junularo de Landregiono Brandenburg, Berliner Str. 49, D-O-1580 Potsdam; temo: "La soraba kulturo", senpaga por negermanoj)

16: **Plejagula renkontiĝo de la germanaj fervojistaj esperantistoj**, Hildesheim, Germanio (Elfriede Kruse, Wiener Str. 121, D-W-6000 Frankfurt/M. 74)

17-20:

Paska Renkontiĝo, Ellecom, Nederlando (Sandra van de Hoef, Spijkerpad 89, NL-7415 AT Deventer, tel. 31/5700 30571; temo: "Sporto")



Homaj bildoj

La naskiĝurbo de Lucas Cranach, Kronach en Norda Bavario (Germanio), promesas premiojn de 10 000 kaj de 5 000 germanaj markoj al la pentrist(in)o(j) kiuj gajnos la konkurson pri "Homaj bildoj".

Premesataj estas ĉiuj teknikoj de la pentroarto; la plej granda formato estu kvar kvadratoj. Lasta tago de la sendo de la verkoj, pruvita per la poŝta stampo, estas la **8-a de majo 1992**.

La pli detalaj kondiĉoj estas riceveblaj ĉe Stadt Kronach, Pf. 1761, D-W-8640 Kronach, aŭ ĉe la loka UEA-delegito Armin Götzner: Giessübel 36, D-W-8640 Kronach-Gehülz.

17-20: **76-a Brita Kongreso de Esperanto**, Sheffield (G. F. Cartledge, 175 Hunter House Road, Sheffield S11 8TZ)

24-03: **13-a Berlina Arbara Renkontiĝo**, Bad Mündler (Hanovro), Germanio (Michael Peters, Steglitzer Damm 32, 1000 Berlin 41, tel. 49/30/796 97 40)

25: **Printempa migrado de germanaj fervojistaj esperantistoj**, el la distriktoj Köln kaj Essen al subĉelia muzeo en Hagen (Heinz Schindler, Max-Klein-Str. 21, D-W-5830 Schwelm)

25-26: **Lingva seminario pri norvegaj literaturo kaj folkloro**, Gullbrannagården, Halmstad (Sveda Esperanto-Federacio, Brunnsgratan 21, S-11138 Stockholm, tel. 46/08/117434)

30-03: **Prepara seminario de la IJK kaj 3-a Kolonia Esperanto-Semajnfino**, Köln, Germanio (Marko Lins, Gemarkenstr. 150, D-W-5000 Köln 80, tel. 49/0221/680 32 50, fakso 0228/23 27 64; temo: "Libertempado" kaj "Kanado/Kebekio")



44-a Kongreso de IFEF
16-22 majo, Germanio

30-05: **Latvia Internacia Printempo (LEA)**, p.k. 150, Riga 50, Latvio, tel. +361395, fakso +555983)

Pekina Internacia Simpozio pri Apliko de Esperanto

9-15 majo 1992

La simpozio okazigas Pekina Esperanto-Asocio kaj ses aliaj organizoj, i.a. la Ĉina Tutlanda Komitato de Unesko. Krom prelegoj kaj diskutoj pri la titola temo, oni aranĝos viziton al fabrikoj, prezentos ĉinajn kuirartojn, pentradon kaj kaligrafion, organizos ekskursojn al pitoreskaj lokoj. Pluaj informoj ĉe la organiza komitato: P.O.B. 1089, Beijing, CN-100034, Ĉinio.


majo

1-3: **39-a Kultura Semajnfino de Saramanda Esperanto-Ligo**, Homburg/Saar, Germanio (SEL, Josef Dorr, Questr. 11, D-W-6607 Querschied)

9-15: **Unua Pekina Internacia Simpozio pri Apliko de Esperanto**, Pekino, Ĉinio (P.O.B.1089, Beijing, CN-100034)

16-22: **44-a Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio**, Münster, Germanio (44-a IFEF-kongreso, Postfach 10 04 30, D-W-6360 Friedberg-Hessen)

22-29: **Unua Simpozio pri Komunika Interŝanĝo de Esperantistoj**, Vladivostoko (el eks-Sovetio oni aliĝu al Esperanto-Societo Pacifiko, prez. s-ro Aleksandr Titajev, 90 Okeanskij Prospekt, 690002 Vladivostok, Rusio; cetera al "Internacia Kultura Laborejo", I.P.O.B. 5458m, Tokyo 100-31 Japanio; tel. + faks. 81-3-3610-5882 / 81-3-3612-6083)



CO.D.I.C.E.

Coordination per la Democratica Integrazione Culturale Europea



La Radikala Partio, transnacia kaj transpartia, opinias ke, en ĝia venonta kongreso, okazonta en Romo de la 29-a de aprilo ĝis la 3-a de majo 1992, oni povas kaj devas ekmarŝigi kiel eble plej baldaŭ la politikan batalon favore al internacia lingvo kaj al Esperanto: la Esperanto-demando estos do temo de la kongreso.

La Radikala Partio havas inter siaj membroj pli ol 120 parlamentanojn kaj registaranojn el 10 ŝtatoj kaj reprezentantojn de 52 diversaj partioj. Ĝi opinias ke nepre estas gravege ne nur gastigi, kiel raportantojn, elstarajn Esperanto-amikojn kaj esperantistojn, sed ankaŭ doni al la afero la plej grandajn kredindecojn kaj politikan ĉeeston: do ĝi urĝe invitas ĉiujn esperantistojn en la mondo, ke ili koniĝu al ĝi nomojn kaj adresojn (al fakso +39.6.65453969; al telekso 610495 prilife; per telegramo adresita al: "Esperanto" Radikala Asocio, via di Torre Argentina 76, Roma 00186, Italio) de parlamentanoj, registaranoj, urbestroj de gravaj urboj, gravaj politikistoj de sia lando, por ke la Radikala Partio povu ĝustatempe inviti ilin al la kongreso.

Nekrologoj

Medardo BIAGI (1907-1991), malnova membro, regula kongresano kaj apoganto de Societo Zamenhof, mortis la 7-an de decembro en Bologna (Italio).



Lu JIANBO (1904-1991), komitatano de ĈEL, membro de UEA kaj SAT, forpasis en Chengdu (Ĉinio) la 8-an de decembro. Li esperantistigis en 1920, kaj baldaŭ ekamikis kun Bakin. En Nankino li propagandis anarkiismon kaj zamenhofismon. En 1934 li redaktis la gazeton *Verda Standardo*, ĉiniga Teorio de Esperanto de Varankin, kaj eldonis librojn pri gramatiko kaj vortofarado de Esperanto. Ekde 1944 li instruis pri historio de la antikva Grekio kaj Romio en Siĉuan-Universitato en Chengdu kaj gvidis tie Esperanto-kursojn. Dum la 70-aj jaroj li partoprenis en la laboroj por esperantigaj poemoj de Maŭ Ze-dong kaj kompili Esperanto-Ĉinan Vortaron. Li

ĉiniga *Ezopa Saĝo* kaj aliajn poemojn de Kalocsay, kaj tradukis novelojn de A. Tolstoj. Li estis ankaŭ elstara poeto kaj prizinto en la ĉina lingvo: eldonigis pluraj liaj volumoj.

Angelé JUDICKIENĖ-PALIUKAITĖ (1934-1991), kemiistino, mortis la 6-an de julio en Litovio. Ŝi multajn jarojn administris la eldonadon de samizdata Esperanto-revuo.

KAWAMURA Sin'itirō (1912-1992), profesoro pri biokemio, mortis la 22-an de januaro en Kōbe (Japanio). Li estis komitatano de UEA, komisionano de Internacia Kongresa Universitato, kaj verkinto de pluraj kemiaj lerniloj por la Someraj Universitataj Kursoj.

Patricia C. SINCLAIR (1910-1991), emerita instruisto, forpasis decembre en Buchhaven (Britio), kie ŝi estis loka delegito kaj fakdelegito pri edukado.

J. A. van der VEEN (1905-1991), delegito en Doetinchem (Nederlando), mortis en septembro.

Miquel VILAGRAN i LLORENS (1912-1991), kunfondinto de Kataluna Esperanto-Asocio kaj dumviva membro de UEA, forpasis la 23-an de decembro. Kun sia edzino li gvidis la Esperanto-grupon de la barcelona Unesko-klubo.

Peter ZACHO (1911-1991), instruisto, forpasis en Danio la 12-an de decembro. Li esperantistigis en 1935 kaj dum pluraj jardekoj membris en UEA, por kiu li tre sukcese gvidis la filatelan fakon. Post 1974 li forte subtenis Ivo Lapenna, eldonante ties *Hamburgo en retrospektivo* (2-a eld. 1977), *Kritikaj studoj defende de Esperanto* (1987), *Juraj terminologiaj problemoj* (1987), kaj la *revuon Perspektivo* (1976-1981) kaj *Horizonto* (1982-1987), trij provizivis forumon por la agado de Lapenna de post 1974. La Eldonejo Perspektivo, fondita de Zacho en 1976, eldonis ankaŭ la verkon *Memorlibro pri la Internacia Jubilea Konferenco en Graz 1987* (1989). Li estis estrarano de ICNEM kaj sekretario-kasisto de Fondaĵo Ivo Lapenna, kiun li fondis kun Paul Nergaard en 1984.

Oficiala informilo

PATRONOJ DE TEJO 1992

Aŭstralio: Max Wearing. Belgio: Stella De Weerd. Britio: Ian Jackson; Martyn H. McClelland; M. Tresidder. Germanio: Günther Becker; Maria Vitalyos; Thomas Bormann. Francio: Michel Cavelan; Henri Boyet; Jacqueline Trésorier; Daniel Maynaud; Roger Despiney; Renée Triolle. Israelo: Jehoŝua Tilleman. Italio: Ada Fighiera-Sikorska; Clara Gubbioli Carli; Carla Siardini. Japanio: Joel Brozovsky; Hirotoju Hukumoto; Humiya Morita; Bun'iti Isizaki; Yukio Izumi; Zyun'iti Sibayama; Koichi Kai; Utako Kobayasi; Hiroo Kodama; Yosiki Tatum; Hiroshi Takahasi. Kanado: Stevens T. Norvell Jr. Kanario: Aurelio Solis y Pi; Maria Pi Maynar. Nederlando: F.J. Pieterzon-Kruger; H. ten Hagen; W.F. Huppertz; J. Soeteman; Louise Adelaar; Maud Meijwes; Willem Spoelder; Myny Massarvan Diepen; W.L. van Leeuwen. Nov-Zelando: D.J. Langman. Usono: Scott W. Dear; Neal D. McBurnett; Roy Lee Campbell.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Germanio: Werner Heinrich. Usono: Hiram Elwin Reed. SUBTENANTOJ (mini-

sume \$25): Aŭstralio: Teresa M. Metherall. Brazilo: Cleber de Moraes Lemos. Finnlando: Hemmo Tietti. Usono: David C. Halley; Franklin Montenegro Rodas; Glenn R. Williams; Julie L. Regal; Ralph A. Lewin. AMIKOJ (minimumo \$10): Aŭstralio: John B. Moore; T. Elliott. Germanio: Richard Wluka. Usono: Joseph Carson; Douglas E. Rogers; John Atkinson; Martin R. Bartels; Pedro Ortiz Bailon; Pierre C. Jelenc; Prenda E. Cook; Stefan Slak.

SOCIETO ZAMENHOF 1992

Aŭstralio: L.V. Scott; Ralph Harry; Teresa M. Metherall. Belgio: Eliza Kehlet; Grégoire Maertens; L. Dréze. Brazilo: Alvaro Rabêlo. Britio: E.E. Mallett; Ian Jackson; Judith Jackson; Sybil V. Sly. Danlando: Ejnar Hansen. Finnlando: Harri Tuomola; Heta Kesälä; Juho Pyykönen; Liisi Oterma; Sirka Synnöve Mynttinen. Germanio: Harry Bily; Bruno Vogelmann; Elisabeth Hirsch; Martin Gründler; Julie Winter; Jean Prager; Richard Hirsch; Werner Heinrich. Francio: André Brest; Clara Troper; André Gilles; Pierre Guérou; Henriette Cortes; Hélène Gauducheau; Jean Gibaux; Jean-Paul Beau; Odette

Bernet; Petro Cugny; Roger Despiney. Italio: Clara Gubbioli Carli; Michele Mariano. Japanio: Bun'iti Isizaki; Kazuko Kikusima (Krizantemo); Iwao Katō; Kyōhei Nakazima; Wilhelm Schmid; Kōiti Simizu; Takeo Sugano; Toyozo Nisikawa. Jugoslavio: Jožica Židanik. Kanado: Edward William Woodruff; Stevens T. Norvell Jr.; Luksemburgo: André Ruysschaert; Brian R. Moon; Claude Nourmont. Nederlando: M.van Bentum-v.d.Broek; Dini Kappert; Louise Adelaar; Maud Meijwes; S.A.K. van der Zee; Myny Massarvan Diepen; W.A. Verloren van Themaat; Willy Keizer-Rosenkrantz; Gerda H.M. Wulfers-Meddens. Norvegio: Margrete Landmark; Olav Reiersøl. Nov-Zelando: D.J. Langman. Svedio: Amy Nilsson; Bertil Bengtsson; Sten Axel Bromar; Eugen Ryttenberg; Gustav Nygård; Harald Andersson; Henrik Karlsson; Leif Holmlund; Olle Olsson; Gunhild Tistad; Tore Johansson; William Malmsten. Usono: Bruce Arne Sherwood; Cecelia Peterson; David Wolff; D. Gary Grady; Humphrey Tonkin; Julie L. Regal; Lucille C. Harmon; Margaret L. Barkley; Milton O. Brown; Robert A. Swenson; Sidney S. Culbert; William R. Harmon; William H. Schulze. [Forpasisintaj:] Gaston Waringhien.

Ai ĉiuj tre korean dankon!

UEA

Dua publika lernejo en Ĉikago ekinstruas Esperanton al ĉeknaboj 11-14-jaraj. Multnaciaj salutoj estus tre ĝoigaj ĉe la instruistino: S-ino Adrienne LeDree, Carter Middle School, 801 E. 133 Place, Chicago, IL 60627, Usono.

22-jara pola studento, vendisto (komencanto) korespondus tutmonde. Intereso: turismo, biciklado. Piotr Podkocki, ul. Barbary i Bogumita 6/6, 62-800 Kalisz, Pollando.

Mi havas 50 foliojn de korespondajoj kun Prof. Waringhien. Kontraŭ pago de 10 internaciaj respondkuponoj (fotokopiaj kaj sendaj kostoj) mi volas sendi fotokopiojn. Willem Verloren van Themaat, Volkerakstr. 38 I, 1078 XT Amsterdam, Nederlando.

Flegisto-radiologo volas labori eksterlande. Abderrazak Tabka, rue Bizerte, No 72bis T.N. (4070) M'saken, Tunizio.

Por kuragiĝi la novajn esperantistojn en la novorganizita Esperanto-kurso ĉe Lycée Camille Pizarro, Classe "Europe", 95300 Pontoise (Francio), sendu bk-salutojn. Dankon.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,40 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripetado de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Ĉu fakulo volus instrui librotendonon per Esperanto aŭ/kaj per la angla al s-ro Evaristus Attah, P.O.B. 234, Nsukka, Enugu State, Nigërio?

Mirinda Kolombio de Kolombiaj Esperanto-Eldonaĵoj: Diversaj aspektoj de la belega lando, "Pordo de Sud-ameriko", en luksa 18-poŝtarka ujo, kun tekstoj en Esperanto. Mendoj ĉe: Luis Felipe Salderrriaga, Poŝtkesto 5567, Medellin, Kolombio.

43-jara direktoro de la Wuhan-a Esperanto-Asocio, civila inĝeniero, deziras korespondi. Xu Xian-wei, 430080, Wuhan Qingshan HongGang-cheng 6 Jiefang 37-3, Ĉinio.

Hungara lernejo dungus du pedagogojn ekde aŭgusto 1992 por intense instrui Esperanton al 6-jaraj infanoj. Fondajo Talento, H-2041 Budaörs, Pf.102 Hungario. Fakso 36/1/140 60 97.

Ni volus ludi simfonion de Mozarto dum la Viena UK! Ni serĉas pluajn orkestranojn: violonojn, aldojn, violonĉelojn, kornojn, transversajn flutojn, hobojojn kaj klarnetojn – kaj dirigenton. Skribu al Thomas Kleemann, Bahnhofstr. 95, D-W-6904, Eppelheim, Germanio.

Emerita vartistino 61-jara deziras korespondi kun katolika irlandano. F-ino Claude de Coudenhove, 104 faubourg Madeleine 45000, Orléans, Francio.

Korespondo-petojn kun japanoj konstante akceptas Japana Esperanto-Korespondo-Servo, ĉe KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

Ĉiujn mi dankas kiuj esprimis kunsenton pro la morto de mia patrino aŭ gratulis pri mia redaktorigo ĉe *Esperanto*. István Erlt.



Ĉu vi ŝatas rustikan medion? Malkovru la vilaĝon IGELBACH, la koron de la naturparko "Pfeifer vald" (Palatinata Arbusto), en idilia germana valo! Meze de pinarboj, la gastejo "Haus Mühleck" (Esperante: "Domo Muela Angulo") malfermas sin por Esperantoj. Ekskursu, konferencu kaj feriu ĉe Waldspeisegaststätte "Haus Mühleck", IGELBACH, Am Mühleck, K 17, D-W-6738 Elmstein 2 (germanlingvaj informoj). Informoj en Esperanto ĉe Esperanto-Centro Humanismo, IGELBACH, Schlossgasse 30, D-W-6738 Elmstein 2.

Jam la trian fojon:
ESPERANTA PRINTEMPO EN VIENO
1-a –3-a de majo 1992

**JES, ESPERANTO
ESTAS TAŬGA LINGVO**

Prelegos Claude PIRON
kaj paralele

**INTERNACIA KURSO
POR TUTKOMENCANTOJ**

Prezo nur: 40,- gld.

Skribu al Internacia Esperanto-Muzeo,
Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 WIEN, Aŭstrio

FUNDAMENTA KRESTOMATIO

de L. Zamenhof
estas denove aĉetebla!

Elĉerpita antaŭ tuta jardeko, tiu klasika fundamenta antologio nun reaparis kiel volumo 6 en la moderna vesto de la Jubilea Kolekto Jarcento de Esperanto.

La nova 18-a eldono, prioritita de prof. G. Waringhien, faras maksimumajn klopodojn tekste reiri al la 1-a eldono de 1903, sed grafike resti ĉe la bela 17-a eldono de 1954.

18 + 446 paĝoj. Tole bindita kun legrubando kaj kromkovrilo. 21cm. ISBN 92 9017 044 1. Prezo: 48,00 guldenoj (32,00 gld. ekde 3 ekzempleroj).

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

MONUMENTA

fariĝis la vivlaboro de Itō Kanzi (Ludovikito), kies Plena Verkaro de Zamenhof atingos baldaŭ la 40-an volumon. Elektu el jenaj novaĵoj:

LA PLENA ORIGINALARO:

unua etapo de esperanto	120,00
ĝis la homaranismo	120,00
destino de ludovika dinastio	120,00

LA AMATA TRADUKAĴO:

fabeloj de andersen	120,00
---------------------	--------

LA RIĈA KROMRIKOLTO:

ludovikologiaj biografietoj	37,50
aŭtografoj de ludoviko	48,00
ludovikaj vortaroj el la 19-a jarcento	48,00
leteroj de sebert al ludoviko	48,00
kial ludoviko abdikiĝis?	48,00

LA UNUA LIBRARO:

ludovikologia dokumentaro I	57,00
ludovikologia dokumentaro II	57,00
ludovikologia dokumentaro IV	57,00
ludovikologia dokumentaro VII	57,00



eldonejo ludovikito

Mendu de la Libroservo de UEA.

Ĉu vi jam konas tiujn ĉi librojn?

Famaj gramatikaj verkoj de prof. ŜULCO Rikardo:
Pledo por unueca lingvo; 276 p.; bindita; 45,00 DM
Sur la vojoj de la Analiza Skolo; 280 p.; 32,00 DM
La sesa regulo; 3 kajeroj; ĉ. 110 p.; 18,50 DM
Pirono Klauĉo kaj la malbona lingvo; 28 p.; 5,00 DM
Mendu ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe la

Esperanto-Centro, D-W-4790 Paderborn, Pf. 1450
Telefona 05251-27612; Telefakso 05251-21507
Petu nian novan Libroliston n-ro 9.



Ĉu vi konas du infanojn?
Aŭ pli? Se jes, helpu al ili partopreni en nia nova projekto:
MONDO-RONDO.



MONDO-RONDO estas internacia koresponda projekto inter infanaj grupoj pri monda geografio, bildkarte. Ne necesas, ke vi estu instruisto. Necesas nur, ke vi estu gvidanto kaj tradukanto. Helpu al la infanoj verki, *per sia nacia lingvo*, du-tri mallongajn frazojn pri interesa bildkarto. Traduku la frazojn Esperanten. Infano – *ne* vi – kopiu la frazojn sur la bildkarton. La grupo sendu la bildkarton al la 34 lernantoj en:

LA ESPERANTO-KLUBO
8140 Greenlawn Drive
San Diego, CA, 92114, USA.

Ili sendos al vi liston de ok aliaj infanaj grupoj kiuj volas interŝanĝi bildkartojn, kun mallongaj mesaĝoj skribitaj de infanoj.

Por pli da informo, vidu p.6-7 en la januara numero de *Esperanto*.

